Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 20 — Trimonata

3/90

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: István Ertl

Teknika redaktisto: Stefan MacGill

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK
H-1364 Budapest, Pf. 107
☎ + 36-1-1180-966/185

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

Edward Symoens – *ILEI-konferenco en Hanabanilla* 1
Roland Schnell – *Rimarkoj* 6
Bernard Golden – *Instruado kaj lernado en la "Strategia plano" de UEA* 8
Miroslav Malovec – *Problemoj de skribaj kursoj* 14
Principa regularo de la supra nivelo de la internaciaj ekzamenoj de ILEI / UEA 17
Projekto produkti vid-bend-serion 21
Interkonsento inter UEA kaj ILEI 23
RECENZOJ 24
Buĝeto 1991 por ILEI 29

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Edward Symoens, Putsesteenweg 131/A, B-2920 Kalmthout; telefono (03) 666.62.66 — Kunordigado, informado en pedagogiaj medioj, rilatoj kun Unesko kaj UEA.

Vicprezidanto : Stefan MacGill, Ésö 7.III, H-1034 Budapest Tel. (01) 1351-531 (laboreje) — Internaciaj ekzamenoj kaj iliaj kursoj, statistikado de instruado, internaciaj lerniloj, lerneja projekto, IPR.

Ĝen. Sekretario : *Vakas — provizore la vicsekretario traktas la laboron.*

Kasisto : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby; tel. (0415)-501 52 — Financaj rilatoj kun sekcioj, konferenco, k.a.

Vicsekretario : Malcolm Jones, 41 Causeway, GB-SN 15 3DD Chippenham; tel. (0249) 656041 — Venonta konferenco, lernejana korespondado, unuecigo de naciaj ekzamen-sistemoj.


Membroj : Till Dahlenburg, Feldstr. 13, D-O-2722 Brüel; tel. (09-8576)-528 — Gvido de pedagogia komisiono, internaciaj ekzamenoj, metodikaj kursoj.

Zang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normal Univ., 430070 Wuhan, Ĉinio — Evoluo kaj fondo de sekcioj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko.

24-a ILEI-konferenco en Hanabanilla (Kubo)

22–28 julio 1990

raporto de Edward Symoens



ILEI ne eraris akceptante la defion forlasi siajn eŭropajn radikojn kaj unuafoje organizi sian konferencon en alia kontinento. Instruado komprenebla devis ludi centran rolon en la rapida burĝonado de la kuba E-movado en la lastaj jaroj — kiu liveris la necesan bazon por la okazigo de UK unuafoje en la kariba regiono, -- kaj eĉ organizado de ne nur tiu UK, sed ankaŭ de IJK (Internacia Junulara Kongreso) kaj de la ILEI-konferenco.

Por multaj eŭropanoj estis la unua konatiĝo kaj eĉ konfrontiĝo kun (sub)tropika lando: kun ĝia multvaria, vivoĝoja loĝantaro, ĝia multkolora flaŭro, ĝia riĉa kolonimemoriga arkitekturo, ĝia brila, varmega suno, kiu kelkfoje tamen ĝenis la homojn...

La ILEI-konferenco estis privilegiita, ĉar ĝi okazis 300 km-ojn for de Havano, en relative nova hotelo kun naĝejo, apud granda lago, meze de belega, iom pli malvarma montara regiono, Hanabanilla. Tie la Kuba E-Asocio sukcesis krei embrion de E-Centro kun belaj klasĉambroj. Tiu favora feria etoso tamen ne malhelpis la 35 ĉeestantojn el 18 landoj fidele kaj aktive partopreni en

la ĉiutagaj diskutoj, ĉu pri asociaj temoj, ĉu pri la kadrotemo „Naciaĵoj en la instruado de Eo".

Post la kvarhora aŭtobusvojaĝo de Havano al Hanabanilla kaj iom da ripozo, la malfermo de la konferenco okazis dimanĉe la 22-an je la 16h30 per prelego de la prezidanto, en kiu li unue honorigis la memoron al la ĝenerala sekretario, Audrey Childs-Mee, forpasinta en majo (*vidu nekrologon en tiu ĉi numero - la red.*) Sekvis ĝenerala enkonduko al la ĉeftemo, kiu baziĝis sur teksto de Miroslav Malovec pri la interferoj de la ĉeĥa lingvo kaj Esperanto (*vidu pp. 14-16 - la red.*). Dumsemajne, pluraj partoprenintoj aldonis informojn pri diversaj aliaj interferoj de naciaj lingvoj kun Eo. La temo, tamen, estas tiom vasta, grava kaj nekomplete esplorita, ke ILEI sisteme kaj funde okupiĝos pri ĉiuj ĝiaj aspektoj kaj implicoj kaj tiel disponos pri pli efika, malpli nacieme influita bazo por „transnacia" aliro de la instruado de Eo.

La pritraktitaj asociaj temoj subdividiĝas en du grupoj:

a) administraj: raportado de landaj sekcioj kaj unuopuloj; la financa situacio de ILEI, la buĝeto de 1991; la Fondaĵo Szerdahelyi; la neceso disponi pri oficisto(j) por plenumi kelkajn temporabajn taskojn; la revizio de la statuto; la interkonsento kun UEA; la Konferenco en 1991 (Voss, Norvegio); la laborplano de ILEI por 1990–1991. En IPR aperos pli detalaj raportoj pri ĉiuj cititaj eroj.

b) pedagogiaj: d-ino Ilona KOUTNY, docento ĉe la Universitato Eötvös en Budapeŝto, prelegis plurfoje pri temoj rilate al la instruado de Eo per komputiloj; Stefan MACGILL pri komunika cel-lingva instruado: kiel ligi gramatikon kun situacioj kaj pri la elformado de internacia gramatiko, detale pri la transitiveco de verboj.

Aldone parolis en 30-minutaj intervenoj:

– BACEV, Marin (BG): Spertoj pri E-instruado en Kubo.
– BECKER, Günther (D): Instruado en la satelita epoko.
– COOL, Gerard (A): Eo: nefinita.
– DAZZINI, Catina (I): Instruado en Italio.
– FILHO A.A.A. (BR): Cirkulanta biblioteko pedagogia en Brazilo.
– MOERBEEK, Rob (NL): Nova kurso en Nederlando: Lerni por fari.
– NILSSON, Bertil (S): Spertoj verki lernolibron por svedoj.
– SZANSER, Irena (PL): Interlingva kaj enlingva interfero.
– VAN DER HORST-KOLI SKA, Mila (PL-NL): Pri diversaj problemoj rilate al Cseh-instruado.
– ROGER, Yafil (F): Enkonduko al la ĉina lingvo.

Ĉiujn prelegojn sekvis starigo de demandoj kaj ofte viglaj diskutoj.

Kiel kutime, Mila van der HORST, direktorino de la Cseh-Instituto en Hago (NL) organizis, kunlabore kun ILEI kaj sub la gvidado de mag. Irena

Oliver Mazodze babilas kun aliaj konferencanoj dum la ekskurso al Trinidad; kafo kun ĵus elpremita sukerkano enmanas kaj emanas.



SZANSER (PL), Cseh-seminarion por estontaj Cseh-instruistoj. Partoprenis en ĝi kaj sukcese trapasis la publikan ekzamenon:

– A.A.A. Filho, Brazilo
– R. Resende, Brazilo
– M. Bacev, Bulgario
– Orellano-Rojas, Argentino
– Oliver Mazodze, Zimbabvo/Kubo

Du kandidatoj sukcese trapasis la Internacian Ekzamenon:

s-ino G.M. Sutton (Nov-Zelando): elementa nivelo
s-ino Nora Moerbeek (Nederlando): meza nivelo kun la noto tre bona.

Menciinde estas, ke por la unua fojo ni adaptis la ekzamenon al la bezonoj kaj eblecoj de blinda kandidatino. (ekz. per uzo de Brajlo-teksto). La Ekzamena Komisiono de ILEI interrilatos kun LIBE (Ligo Internacia de Blindaj E-istoj) por adapti la regularon de la I.E. al ĉi tiu kategorio de e-istoj kaj fari praktikajn aranĝojn por ke ankaŭ blinduloj povu trapasi la ekzamenon senprobleme.

La ferma kunsido okazis vendrede la 27-an je la 20-a horo. La prezidanto, en ĉeesto de la estraranoj Stefan MacGill kaj Bertil Andreasson, resumis la dumsemajnan laboron, enmanigis la diplomojn al la sukcesintaj Cseh-seminarianoj kaj la atestilojn al la sukcesintoj de la I.E.

Sekvis dankvortoj por ĉiuj ĉeestantoj pro ilia diligenta partopreno en la diversaj programeroj. La prezidento aparte dankis kaj transdonis donacon al la surloka motoro malantaŭ la konferenco: Héctor Jiménez, sekretario pri edukado en la estraro de Kuba E-Asocio, respondeca pri ĉiuj praktikaj aranĝoj de la ILEI-konferenco kaj kiu kun granda afableco, senlima pacienco kaj nekontestebla sindono plenumis sian ofte sendankan taskon.

Laborplano de ILEI ĝis la 15-a de julio 1991.

Taskoj de la estraranoj.

Edward Symoens

- Finpretigi kaj eldoni en pluraj lingvoj la broŝuron: *Al nova lingvopolitiko. La propedeŭtika rolo de Eo.*
- Komenci la esploron pri ĉiuj E-centroj, institutoj kaj personoj kapablaj kontentige organizi:

a) internaciajn ekzamenojn,

Rezolucio de la Komitato de UEA en Havano

La Komitato vokas al Landaj Asocioj de UEA kaj Sekcioj de ILEI

– raporti pli komplete ĝis ĉiu jarfino pri la instruado de Eo en sia teritorio.

– kuraĝigi instruistojn kaj instruantojn de Eo en sia membraro partopreni metodikajn kaj superajn lingvajn kursojn, kiaj tiuj organizitaj ĉiujare de ILEI kaj KCE, de la kursejo en Pisanica (Bulgario), de la Universitato Eötvös en Budapeŝto, de la San-Franciska Ŝtata Universitato kaj la Internaciaj Metodikaj Seminarioj.

rekonas la sukcesan restarigon de la internaciaj ekzamenoj, kiujn trapasis 67 kandidatoj el dekkvino da landoj dum 12 sesioj en kvar kontinentoj.

kontentas pri la pretiĝo de regularo por la supera ekzameno kaj invitas al komitatanoj kaj Landaj Asocioj proponi taŭgajn membrojn por la formota Supera Ekzamena Komisiono.

La Komitato konscias ke libervolaj laborfortoj ne sufiĉas por la realigo de la kreskonta agado kaj

apogas la paŝojn de ILEI transmeti partojn de sia laboro sur profesian bazon kaj, spegulante tion

aprobas la sekvan financan disponigon flanke de UEA por la periodo aŭgusto–decembro 1990, ekde kiam la financaj rilatoj funkcios laŭ la nova UEA/ILEI interkonsento:

Eldono de instrurajtiga kurs-materialo	300	gld.
Starigo de la supera ekzameno	300	gld.
Administrado de ceteraj niveloj, legolisto, ekzercaro	300	gld.
Tralaboro de la arĥivaro de prof. I. Szerdahelyi	300	gld.
Situaci-komunika lernolibro	300	gld.
	1.500	gld.

b) instrurajtigajn kursojn kaj ekzamenojn.

- Esplori, kio ekzistas (artikoloj, studoj, prelegoj, disertacioj, ktp.) pri la temo: Naciaj trajtoj en la E-instruado.
- Prepari projekton pri Konsilaro por aktivuloj: Kiel fondi novan sekcion? Kiel funkciigi sekcion? Kiel organizi konferencon?
- Kiel organizi internaciajn ekzamenojn, instrurajtigajn kursojn kaj ekzamenojn? ktp.
- Starti Eo-informkampanjon en internaciaj instrumedioj.
- Pluesplori la financajn eblojn pri eldono de libroj kaj materialo.
- Serĉi dokumentojn pri la temo: 25 jaroj de ILEI-konferencoj.
- Starti ĝeneralan kritikan superrigardon pri ĉiuj disponeblaj didaktikaj materialoj.
- Rilati kun UEA pri UK en Norvegio.
- Rilati kun GCA pri IPR.

Stefan MacGill

- Evoluigi la superan nivelon de la Internaciaj Ekzamenoj.
- Prepari Internacian Lernolibron.
- Finaranĝi kontrakton kun Zs. BARCSAY kaj M. KOVÁCS kaj difini iliajn taskojn: i.a. kunvoki la superan ekzamenantaron kaj administri la mezajn ekzamenojn respektive.
- Superrigardi la preparon de IPR.
- Prepari definitivan version de la statutrevizio.
- Interrilati kun Zs. BARCSAY por starigi elekto-komisionon.

Till Dahlenburg

- Finprepari la „materialon Szanser" surbaze de la interkonsento subskribita kun la aŭtoro.
- Difini la postularon por la superaj ekzamenoj.

Bertil Andreasson

- Interrilati kun Norvegio kaj kun Malcolm Jones pri la 25-a ILEI-konferenco en Voss, Norvegio (1991).
- Interrilati kun GCA pri la ĝisdatigo de la sendolistoj por IPR.
- Interrilati kun la sekcioj por ke ĉi tiuj pli akurate pagu la kotizojn kaj sendu membrolistojn.

Malcolm Jones

- Prepari la 25-an Konferencon en Norvegio, en kunlaboro kun Bertil Andreasson kaj la norvega LKK.

Zang Danchen

- Prepari sesion de Internaciaj ekzamenoj en 1991.
- Finesplori, ĉu la „materialo Szanser" taŭgas por ĉinoj aŭ postulas ŝanĝojn. Proponi eventualajn adaptojn.
- Daŭre varbi membrojn.

Kalmthout, 06-08-1990.
E. Symoens

RIMARKOJ
al la letero de Mila v.d. Horst-Kolinska en IPR 2/90, p. 15 kaj aliaj kontribuoj de la sama numero

Roland SCHNELL, Germanio

Per sia respondo en IPR 2/90 Mila v.d.Horst-Kolinska pruvas, ke ŝi ne komprenis la celon de la kontribuo „La plej facila lingvo malfacile lernebla" de Maria Merla. Oni ne povas malpermesi al la aplikantoj de la Cseh-metodo uzi ĉiun eblecon varbi por tio, kion ili evidente taksas la plej utila por la instruado de Eo. Sed Maria Merla substrekis, ke la Cseh-metodo nuntempe ne povas esti la konvena solvo por la problemoj en la okcident-eŭropaj landoj.

En la revuo „Esperanto aktuell", organo de la Germana E-Asocio (3/1989, p. 7–10) mi (bedaŭrinde germanlingve) raportis pri la situacio de la E-instruado en okcidenta Berlino. Mi konstatis, ke oni ne povas trakti la instruadon de Eo per la metodoj, kiuj estas aplikataj por la instruado de infanoj en la lernejo. La homoj, kiuj lernas Eon, ĉefe estas plenkreskuloj, kiuj lernas libervole kaj, kontraste al la instruado de la angla aŭ franca lingvo, ne atendas profesie uzeblan profiton de la lernado. Tial la instruado devas okazi en formo, kiu estas sufiĉe alloga por ili, kaj kiu instigas regule reveni al la kurso. Ĉu tio efikos, ne nur dependas de la instrumaterialo, sed ankaŭ de la etoso en la grupo kaj de la konduto de la instruanto.

Tiuj, kiuj profesie instruas lingvojn kaj parolas Esperanton, ĝis nun neniun helpon preparis por tiuj, kiuj volontule instruas la lingvon pro tio, ke aperas novuloj, kiuj deziras eklerni la lingvon. Maria Merla prave kritikis, ke ekzistas manpleno de lernolibroj, kiuj estas utiligeblaj, sed neniu lernolibro en la germana lingvo respektas la aktualajn eltrovaĵojn de la didaktiko por plenkreskuloj. Tio ne estas malestimo de la Cseh-metodo – oni devas simple rekoni, ke la kondiĉoj por organizi Cseh-kursojn nek ekzistas, nek estas facile kreeblaj.

Mi supozas, ke la profesiaj instruistoj ne okupiĝas pri la instruado de Eo al grupoj de plenkreskuloj, ĉar ili ĉefe okupiĝas pri la instruado de infanoj aŭ pri la edukado de instruistoj, kiuj poste mem instruos infanojn. Ambaŭ grupoj ne estas tiom liberaj en sia decido, ĉu ili volas partopreni la venontan lecionon aŭ ne, kiel plenkreskulo, kiu decidis lerni Eon en la loka klubo.


Mi tre ĝojas legi en la sama numero de IPR raporton de István Ertl pri la lernejo en Budaörs (90/2, pp. 13-14.). Tie la lernado de Eo por infanoj estas amuza afero, ne peno. Estus necese ellabori similajn metodojn ankaŭ por la instruado de plenkreskuloj. Ke tiu ĉi postulo tute ne estas memkomprenebla, montras la „Meditado super nia metodiko" de Kruco. Kompreneble la logiko

kaj reguleco de la gramatiko de Eo faciligas la lernadon kaj estas personoj, kiuj sukcesis lerni Eon nur per gramatiko kaj vortaro. Sed infanoj tute ne lernas laŭ tiu ĉi metodo kaj ankaŭ por plenkreskuloj oni devus elpensi pli amuzajn formojn. Eo, kiel vivanta lingvo, estas pli ol „senerara prezento de la signifo(j) de la radikoj". La metodo tie prezentita denove dependas de forta, klera kaj sperta instruanto, kiu „bezonas grandan trovemon por konstante teni la atenton de la lernantoj". Eĉ pli: La instruanto kavzaŭ perfortas la lernantojn per „sufiĉe maŝineca laboro", sed poste ili estos „dankemaj". Laŭ miaj spertoj en Berlino la libervolaj lernantoj ne estos dankemaj, sed ili estos for.

Mi urĝe petas la profesiajn instruistojn finfine reagi al problemoj de la lokaj grupoj. Estas necese instrui Esperanton nun! Ni ne povas atendi, kiam ekzistos la edukitaj instruistoj, kiuj kapablas instrui laŭ la Cseh-a aŭ iu alia science ellaborata metodo. Ni bezonas didaktikajn helpilojn, kiuj ebligas al ĉiuj, kiuj sufiĉe flue parolas Eon, instrui Eon al aliaj plenkreskuloj. Multaj sentas sin devigataj verki lernolibrojn, sed ili ne pretas kunlabori. En Germanio mi aŭdis pri tri aŭ kvar projektoj, kiuj kompreneble intencas agi sole kaj sendepende.

Mi eksciis pri diversaj konsentaj, eĉ aplaŭdaj reagoj al la tezoj kaj proponoj de Maria Merla, sed mi ne aŭdis pri fundamentaj kontraŭaj argumentoj. Tio signifas, ke ekzistas gvidlinio, kiu ebligus al grupo de instruistoj prepari la necesan instrumaterialon kaj verki konsilojn por la utiligo. Modela por mi restas la didaktikaj konsiloj de Till Dahlenburg, kiuj ebligis eĉ al mi gvidi kurson por komencantoj en t. n. popola altlernejo sen iu formo da spertoj pri la instruado de fremda lingvo. Ili apartenas al la „Taschenlehrbuch Esperanto", kiu nun malpli ol iam antaŭe estas aplikebla en okcidenta Germanio pro sia GDR-eca aspekto kaj enhavo. Mi ne povas kredi, ke en la nuna situacio la eldonejo kapablas rapide prezenti purigitan version, sed mi esperas, ke la E-Asocioj en la germanlingva teritorio (inkluzive Aŭstrio, Svislando) kunlaboros por realigi la urĝe bezonatan instrumaterialon.

Bedaŭrinde la „Germana Esperanto-Instituto" komplete fiaskis en tiu ĉi afero. Tie oni ekskluzive strebas al la agnosko de Eo en lernejoj kaj ignoras la bezonojn de la lokaj grupoj.



Instruado kaj lernado en la Strategia Plano de UEA

Bernard GOLDEN, Hungario

Enkonduko

Responde al la invito de la redakcio de *Esperanto* sendi reagojn por diskuto pri la projektita Laborplano de UEA de la dua jarcento de Esperanto (Esperanto, oktobro 1988: 166–177), mi atente tralegis la tutan tekston kaj konstatis, ke komentado pri ĉiu grava punkto bezonus prezentadon, kiu estus same detala kiel la plano mem. En la nuna artikolo mi limigos min al unu temo, kiu aperas en pluraj sekcioj: la instruado kaj lernado de Eo.

Ĉiu, kiu objektive ekzamenas la situacion de la disvastiĝo de Eo en la mondo, devas konfesi, ke la aktuala stato de instruado kaj lernado de la lingvo ne estas kontentiga. Ĉu iam en la tuta historio bone funkciis tiuj agadoj? Movadhistoriistoj bonvolu respondi!

Minaco kontraŭ Esperanto

Ruĝkrajone substrekenda estas la konstato en §45 (a), ke unu el la minacoj – miaopinie la plej grava – kontraŭ la ekzisto de Eo estas la nesufiĉa scio de la lingvo. Mi ne hezitas aserti, ke en ĉiuj periodoj de la evoluo de Eo relative malgranda nombro da ellernintoj de la lingvo pluportis la torĉon kaj nutris la flamon, spite al la negativaj agadoj de denaskaj krokodilantoj, vivdaŭraj komencantoj kaj uzantoj de la unugroŝa Eo. La seriozaj, agemaj e-istoj devis konstante barakti en tiu stagna marĉo de apatio kaj memkontento, por ke estu videblaj spuroj de progreso. Okazas, ke ie oni iras unu paŝon antaŭen rilate primajstradon de la lingvo, sed aliloke la instruado-lernado glitas du paŝojn malantaen, kiam seniluziiĝintoj fermas siajn lernolibrojn, forlasas kursojn kaj por ĉiam male-istiĝas.

Kial oni plibonigu sian lingvoscion?

La demando, kiun neniu aŭdacas vortigi – kaj povas esti, ke tiuj, kiuj surpaperigis la grandiozan Strategian Planon, tute ne konsciis pri ĝi – estas jena: ĉu e-istoj vere volas plibonigi sian lingvoscion? Kiuj argumentoj ekzistas por konvinki eklernantojn, ke ili devas penadi, por ke ilia lingvonivelo estu pli alta, se ĝis nun ili sukcesas atingi siajn limigitajn celojn surbaze de rudimenta scio de la lingvo? Defia tasko por movadaj aktivuloj kaj propagandistoj estas trovi manieron *devigi* pluan lernadon post la elementa kurso aŭ la unua dekleciona lernolibro. Ĉu pravas reprezentantoj de lingva strutpolitiko en E-ujo kiel Dermond Quirke, kiu disvastigas la herezan vidpunkton, ke estas pli grave uzi la lingvon ol uzi ĝin ĝuste[1], aŭ kiel Preben Bagger, kiu misuzas la koncepton de malfermiteco (t.e. toleremo) por libere permesi eraran lingvouzon(2)?

Mi trovis eĉ pli harstarigan esprimon de la sama indiferenteco pri strebado al bona scio de Eo en jena misa konsilo al gepatroj de denaskaj e-istetoj.

„Same ne maltrankviliĝu pri via (ne)scio de perfekta Eo. La infano parolos precize la saman specon de Eo, kiun vi parolas al li. Do, se vi havas germanan prononcon, li havos germanan prononcon. Sed, ĉu tio vere gravas?"[3].

Se tiel estiĝas kaj evoluas lingva (mal)kapablo ĉe denaskuloj, ne plu estas espero por unueca normlingvo en la estonteco. Ju pli da verduleto estos generitaj, des pli dekadencos la lingvouzo! Por bremsi tiun procezon, estas konsilinde persvadi gepatrojn, kiuj ankoraŭ ne primajstris Eon, bridi sian entuziasmon kaj nepre ne instrui malbonan Eon al siaj infanoj.

Malalta faka lingvonivelo

La minaco de malalta lingvokapablo estas multe pli grava ol volas kredigi la lingvaj strutpolitikistoj en E-ujo, ĉar ĝi troviĝas ankaŭ en fakaj verkoj, ĉu el la plumoj de fakuloj mem, ĉu en fak-temaj artikoloj verkitaj de laikoj (4). Kvankam mi kutimas atentigi redakciojn pri tiuspeca erara lingvouzo, oni ne volonte publikigas mian publikan riveladon de la mispaŝoj de fakulo en Eaj verkoj temantaj pri la propra fako. Kiel estas eble fari eĉ paŝeton antaŭen, se oni balaas lingvajn malpuraĵojn sub la tapiŝon?[5] Aldonenda en la Strategia Plano estas sekcio atentanta la neceson plialtigi la nivelon de faka verkado en Esperanto.

Individuaj membroj kaj regiona kaj landa agado

Ankoraŭfoje en la sekcioj de la laborplano dediĉitaj al individuaj membroj (§866) kaj al regiona kaj landa agadoj (§951) estas menciita la lingvouzo. UEA celas igi la individuajn membrojn pli aktivaj, por ke ili ĉeestu kongresojn, aĉetu librojn, fariĝu delegitoj, perfektigu sian lingvoscion kaj instruu. Tiu alineo estu modifita por meti perfektigon de la lingvouzo en la unuan lokon; nur poste eblas doni al tiuj homoj respondecon pri la aliaj taskoj. En la alineo pri regiona kaj landa agado, atento pri lingvoscio jam havas prioritatan pozicion.

Instruado

Kiel plenumi tiun taskon? Por ekscii tion, estas necese ekzameni ĉiujn sekciojn de la plano, en kiuj la temo estas aludita. Laŭ §924 sub la rubriko „Kongresoj", malpli grandaj konferencoj, seminarioj ktp. precipe je regiona nivelo havu kiel unu el siaj funkcioj plialtigon de la lingvonivelo kaj pretigon de instruantoj de Eo. Instruado en la Universalaj Kongresoj mem estas proponita en §44 (a), sed tiuspeca unusemajna efemera agado neniel povas esti efika. Ne valoras eĉ sugesti tiun punkton kiel parton de la celo de la UK-oj.

En pluraj landoj oni organizas similajn minikursojn, daŭrantajn ofte unu semajnon sed kelkfoje nur unu semajn-finon! Cetere, oni elpensas diversajn artifikojn por allogi partoprenantojn, serĉantajn la plej rapidan kaj senpenan vojon al alproprigo de Eo, kiu laŭdire estas la plej facila lingvo: la t.n. zagreba metodo prezentas reduktitan vortprovizon; en la pirata kurso oni lernas en ŝercaj (kaj ridindaj) situacioj; kaj la sugestopedio tre konvenas por tiuj, kiuj emas ekdormeti dum kursinstruado. Tamen, edukpsikologiaj esploroj demonstras, ke ĉio, kio estas instruita tre rapide kaj en mallonga tempo, estas nur supraĵe lernita kaj same rapide estas forgesita. Pro tio, ĉiuspecaj mallongdaŭraj Esperanto-kursoj estas trompaĵoj, kiuj perdigas al kursanoj kaj instruantoj fortostreĉon kaj tempon. Estas necese silentigi unu fojon por ĉiam la blufantan propagandadon pri rapida kaj facila lernado. Ĝuste pro tio mi opinias, ke la mencioj de lingvoinstruado en §44(a) kaj plialtigo de lingva nivelo en §924 estu forstrekitaj, aŭ eventuale transigitaj en novan rubrikon titolitan „Laŭŝtupa lingvolernado kaj celhava atingo de pli altaj lingvoniveloj".

Instruantoj

Atentu la esprimon „pretigo de instruantoj" en §924; temas pri instruantoj, ne instruistoj. Jen punkto, kiu devas esti detale pritraktita, ĉar estas certe kiel duoble du kvar, ke la malalta lingvo-nivelo de multaj eistoj estas la rezulto ne de ilia nekapablo aŭ pigreco, sed de neprofesia instruado fare de personoj, kiuj ne estas pedagogie kvalifikitaj instrui fremdan lingvon (6). La sola maniero definitive elimini la fuŝinstruantojn estas varbi diplomitajn lingvo-instruistojn, kiuj lernos Eon kaj poste instruos la lingvon laŭ metodologiaj principoj jam evoluigitaj por aliaj fremdaj lingvoj sur ĉiuj niveloj. Ankaŭ ĉi-rilate estas loko por nova sekcio en la Strategia Plano: „Profesiigo de la instruado de Eo per varbado de kvalifikitaj lingvoinstruistoj".

Lingvolerniloj

Nuntempe oftas diskutoj pri la specoj de libroj, kiuj estos plej urĝe bezonataj en E-ujo dum la proksima estonteco. En unu tendaro aŭdiĝas postuloj de verkoj pri bazaj sciencoj por liberigi lernantojn en certaj landoj de dependeco de fremdlingvaj verkoj en eŭropaj lingvoj, precipe la angla. Membroj de alia tendaro argumentas, ke antaŭ ol povi verki tiajn diversfakajn librojn, estas necese unue kompili fakterminarojn en la koncernaj sciencobranĉoj kaj akordiĝi pri la nomenklaturo. Longe oni diskutas, sed faras nenion. Intertempe beletristoj senĉese publikigas siajn poemkolektojn kaj esperantigas literaturaĵojn el plej diversaj „malgrandaj lingvoj" de minoritataj popoloj. Pri la librotipo meritanta la plej altan prioritaton apenaŭ aŭdiĝas vorteto – lernolibroj! La Strategia Plano ja senkaŝe informas pri la stato de lerniloj en E-ujo en §43(b). Bonaj lerniloj kaj instruiloj mankas, kaj kompare kun tiuj destinitaj al la lernado de etnolingvoj, la verkoj en Eo estas ofte tre primitivaj aŭ malmodernaj. Eĥas tiun plendon leganto de Esperanto(7).

„Ni do ĉiuj daŭre lernu Eon. Sed ĉu ni disponas la bezonatajn lernolibrojn?"

Profesie kvalifikita lingvoinstruisto ne ĉiam povas certigi sukceson sen bonkvalitaj lerniloj. Kaj ne tute kompetenta instruanto, sen helpo de bona lernolibro, facile riskas fiaskigi la lernadon de la lingvo. Por plibonigi la situacion venas la propono, ke UEA okupiĝu pri la eldonado ne nur de lernolibroj (185916), sed ankaŭ de nelibraj lerniloj kiel prononc-kasedoj kaj videomaterialo (§919).

La sekva demando ne estas tuŝita en la plano: kiu preparos kaj verkos tiun materialon? Ĉu la instruantoj aŭ ĉu pli kompetentaj instruistoj? La morna bildo de Eo-lernolibra verkado estis lastatempe evidentigita en tri recenzoj pri verkoj destinitaj al parolantoj de la hungara, hispana kaj franca lingvoj (8), kaj antaŭ kelkaj jaroj aliaj recenzoj atentigis pri difektoj en hungara, angla kaj itala lerniloj (9). Por vere efika kaj fruktodona instruado kaj lernado, estas bezonataj plurspecaj lerniloj verkitaj konforme al la plej ĝisdataj principoj de lingvoinstrua pedagogio. La aranĝo de la gramatikaj klarigoj kaj la enhavo de la lecionoj devas esti specife planitaj por kontentigi la bezonojn de diversaj tipoj de lernantoj: aŭtodidaktoj, kursanoj, infanoj, junuloj, plenkreskuloj kun malsamaj gradoj kaj klereco, scienculoj, parolantoj de diversaj etnolingvoj ktp. Ankoraŭ unu grava faktoro en la preparado de lerniloj estas la motivado kaj bezonoj de la lernontoj. Kiom da aŭtoroj de lernolibroj konsideras tiun ĉi aspekton de instruado kaj lernado?

Kiuj verkos la modernajn lernilojn?

Ĉar ekde 1986 (ILEI) transprenis de UEA ĉiujn taskojn rilate al instruado kaj edukado, ĉu eble tiu organizaĵo okupiĝos pri la verkado de konvenaj lerniloj? Ŝajnas, ke ne. Raporto pri la rezultoj de la 22-a Internacia Konferenco de ILEI en 1988 ne havas eĉ aludon pri tiu ĉi temo(10). Ĉu la Akademio de Eo entreprenos superrigardon de instrumaterialo por certigi pli efikan lernadon de Eo? Ne! Nuntempe la Akademio okupiĝas pri la aprobo de fakaj terminaroj laŭ lingva vidpunkto, sed ekzistas neniu agado rilatanta al la enhavo de lernolibroj.

Eble la plej bone kvalifikitaj lingvometodikistoj devas troviĝi en la Fako Eo-lingvo kaj literaturo en la Katedro pri Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko en la Universitato „Eötvös Loránd" en Budapeŝto. Tie, ekde 1966, Eo estis instruata al estontecaj lingvoinstruistoj. Inter la studobjektoj estas kursoj pri lingvistiko kaj lingvoinstrua metodologio. Bedaŭrinde, neniu provo estis farita de la antaŭa respondeculo de tiu stud-programo, d-ro István Szerdahelyi, verki la specojn de altkvalitaj kaj modernaj lernolibroj, kiuj estas nuntempe bezonataj. (*D-ro Szerdahelyi verkis plurajn lernolibrojn popularajn kaj vaste uzatajn eĉ internacie — kategorie aserti, ke ili ne estas altkvalitaj nek modernaj, niaĵuĝe estas troigo — La red.*) Post lia morto, neniu venis anstataŭi lin sur la tereno de lingvoinstrua metodologio. Tiukiale la lingvoinstrua situacio en lia propra lando, Hungario, nun estas en kriza stato, kiel ilustras jena plendo farita de provinca instruanto en Esperanto[11].

„...mankas konvenaj lernolibroj...Ankaŭ la plenkreskula progresa kurso ne havas konvenajn lernolibrojn por la supera ekzameno. Kvankam en la lastaj jaroj aperadis kelkaj lernolibroj, sed ili estas parte tro koncizaj, parte na taŭgaj por kursoj aŭ ili konvenas nur por infanoj."

Sekvas el tiu prezentado de la situacio, ke UEA, antaŭ ol ĝi povas eldoni lernilojn laŭ la laborplano, devas unue trovi fakulojn, kiuj kompetentas verki ilin. Ĝuste tie estas la tubero en la afero, kiu faras tiun proponon en la plano vana.

Konkludo

Pozitiva ero en la Strategia Plano estas Ĉapitro 5, „Prioritatoj", en kiu la unua, pri disvastigo de Eo (§52), konsistas el du agadoj: 1. informado, 2. instruado. Supozeble instruado sekvigas lernadon. Mi tre scivolas, kiom da aliaj pensemaj e-istoj, en siaj reagoj pri la laborplano, donos la saman emfazon al instruado kaj lernado, kiun faras tiu ĉi artikolo. Mi estas pesimisma, ĉar tiuj punktoj facile perdiĝas en la labirinto de aliaj temoj, kiuj estas pritraktendaj.

Notoj

1. Dermod QUIRKE. Erari estas home... **Esperanto** 1988 julio-aŭgusto: 137.
2. Preben BAGGER (citita en: Esperantologia konferenco: Normoj gravas, Ĉiukampe). Esperanto. 1988 septembro: 153.
3. Anna BRENNAN, Renato CORSETTI. La stadioj de dulingveco. **Cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj**. 1988 junio; 3: 2–4. Vd. pĝ. 4.
4. Bernard GOLDEN. Oni uzu fakajn terminojn, esprimojn kaj nomojn — sed nur fake! Akademiaj studoj. 1987: 54–55. Publikigita ankaŭ en: **KERNO-Cirkulero** 1988 aprilo; 7: 4. Opus Nigrum. 1988; 1 19. **Starto**. 1989. 2: 14–15, 18.
5. Bernard GOLDEN. Priskribo de stelaroj kun lingvaj eraroj. La Gazeto 1988 aprilo; 16: 26–27.
6. Bernard GOLDEN. Inadequacies in the teaching of Esperanto. **The Australian Esperantist**. 1981 julio-aŭgusto; 189 (269): 39–40.

a. Bernard GOLDEN. Fuŝinstruado de Esperanto. Nitra Informilo. 1982 februaro; 1: 6–8. Publikigita ankaŭ en: **Informilo pri la Instrua Laboro**. 1986 novembro-decembro: 7.

b. Bernard GOLDEN. Normoj kaj celoj de la universitata instruado de Esperanto. Internacia Pedagogia Revuo. 1980; 1:3–12.

7. Rob KEETLAER. Ni mem devas lerni Esperanton! **Esperanto**. 1988 novembro: 201.
8. RECENZOJ. Internacia Pedagogia Revuo. 1988 aprilo-junio; 2.

a. Bernard GOLDEN. Dr. István Szerdahelyi. **Kevés szóval eszperantóul**, Budapest, 1987. (pĝ. 19–26).

b. Zsuzsanna VARGA-HASZONITS: Fernando de Diego. Nuevo método de Esperanto para clases y autodidactas, Madrid, 1982. (pĝ. 27–28).

c. István ERTL: Edmond Ludwig kaj Renée Triolle. **Nouveau cours d'espéranto avec ou sans professeur**. Madrid, 1986. (pĝ. 28–31).

9. Bernard GOLDEN. Aldonaj rimarkoj pri 30 nap alatt eszperantóul. **Budapeŝta Informilo** 1980 junio; 6:25–27.

Bernard GOLDEN. Kompleta, ampleksa, sed iom mankhava. (Recenzo de Esperanto — The International Language de W.J. Downes). **Heroldo de Esperanto** 1983; 14:4.

Bernard GOLDEN. Kiel recenzi lernolibron? (Lingua Esperanto, Corso di base de Renato Corsetti, Mauro La Torre kaj Nino Vessella). **Internacia Pedagogia Revuo**. 1985; 3: 75–77. Publikigita ankaŭ en Esperanta Finnlando. 1985; 5: 12–13. **Esperanto Teacher**. 1986 printempo; 149: 9.

10. Zsuzsa BARCSAY. Tradiciaj kaj modernaj instrumetodoj de la Esperanto-instruado. Budapeŝta Informilo. 1988 novembro; 11: 13.
11. József NÉMETH. Veszprém. **Budapeŝta Infomilo**. 1988 novembro; 11: 12.

POSTNOTO: En la laborplanoj de ILEI kaj la rezolucioj pri edukado de UEA staras jam de du jaroj la plano verki modernan situaci-komunikan lernolibron, kiu formos la bazon de lerno-pakaĵo. Tio unuavice por junaj lernejanoj (10- ĝis 14-jaraj), sed la sama strukturo estos utiligebla kun aliaj situacioj por plenkreskula lernolibro. Sed tion devus realigi personoj, kiuj devas ankaŭ plenumi aliajn taskojn en la movado kaj ILEI. Se ILEI pretus vivi sen du numeroj de IPR, kvarmilo da lernantoj rezigni pri du numeroj de *Juna amiko,* ILEI dormigi sian statut-revizion plian jaron, same pri la starigo de la supera ekzameno, nuligi ĉiujn ceterajn ekzamensesiojn dum duonjaro, prokrasti ĉiujn ceterajn eldon-projektojn kaj forlasi la korespondadon, aŭ trovi novajn laborfortojn prizorgi tiujn taskojn, mi persone garantias, ke tia moderna lernolibro estus ĝis marto 1991 jam finverkita, presita kaj akirebla en via plej ŝatata movada librovendejo. Sed kiu kuraĝus rajtigi tian reprioritatigon?

smg

Problemoj de skribaj kursoj

Miroslav MALOVEC, Ĉeĥoslovakio

Kiel lektoro de skribaj kursoj mi laboras jam kvin jarojn. Mi havis pli ol tricent kursanojn, do sufiĉan kvanton por konstati certajn specialaĵojn de ĉi tiu instru-metodo. Eble la plej grava faktoro estas aŭtodidakta memstareco de ĉiu lernanto: li ne povas kaŝi siajn mankojn en kolektivo de kunlernantoj, nek ricevi sufloran helpon de ili. Plene montriĝas, ĉu la kursano komprenis aŭ miskomprenis la lernaĵon, ĉu li regas aŭ ne la regulojn de la patrolingva gramatiko. Bedaŭrinde, en la lasta tempo mi rimarkas, ke la teoriaj scioj pri la gepatra lingvo dekadencas, ke eĉ multaj mezlernejanoj ne regas sufiĉe bone analizadon de vortoj kaj frazoj, kaj tial ili ne kapablas ilin traduki.

Al la skriba kurso aliĝas anoj de elementaj, mezaj, metiaj kaj altlernejoj, soldatoj ĝuste nun servantaj, plenkreskuloj de diversaj profesioj kaj klerecoj. En ĉiuj ĉi grupoj estas unuopuloj, kiuj facile komprenas ĉion, kies hejmtaskojn mi povas rapide korekti skribante la noton „sen eraroj". Ili estas tre malmultaj, sed ili ekzistas. Same malmultaj estas unuopuloj, kiuj komprenas absolute nenion, kaj kiujn helpas nenia eksplikado de la lektoro. Sed plej multaj kursanoj troviĝas inter tiuj du ekstremoj: ili faras multajn erarojn, sed post pacienca eksplikado ili iom-post-iom forigas ilin. Tamen la dudek lecionoj ofte ne sufiĉas por forigi ĉiujn miskomprenojn, kaj multaj lernantoj finas la kurson kun gravaj eraroj. Restas nenio alia ol esperi, ke ili daŭrigos la studadon kaj post certa tempo korektos siajn mankojn.

La erarojn mi klasifikus je du grupoj. Tiuj de la unua grupo estas kaŭzitaj de nesufiĉa alkutimigo kaj aŭtomatigo de gramatikaj reguloj, precipe la akuzativon oni ofte forgesas. Forigo de ĉi tiuj mankoj estas afero de tempo kaj trejnado. La aliajn erarojn kaj mankojn kaŭzas malbonaj teoriaj scioj pri la gepatra lingvo. Nia esceptoplena patrolingvo tre erarigas niajn kursanojn, kiuj tendencas imiti ĉiun gramatikan malregulaĵon ankaŭ en Esperanto, ĉar ili ne konscias, ke temas pri malregulaĵoj. Ekzemple en ĉiuj slavaj lingvoj post la numeralo *kvin* kaj post nombroj pli altaj estas uzata genitivo anstataŭ nominativo, tial niaj kursanoj tradukas: unu frato, du fratoj, tri fratoj, kvar fratoj, kvin da fratoj, ses da fratoj, sep da fratoj ktp.

La preterito kaj futuro de verboj en la ĉeĥa lingvo uzas la helpverbon *esti*, kio rezultigas jenajn tradukojn: mi estas telefonis, mi estos telefoni. Multaj kursanoj eĉ post plurfoja klarigado ankoraŭ ĉiam ne kapablas kompreni, ke la helpverbo estas ĉi tie nur gramatikaĵo kiel la Esperantaj finaĵoj *-is, -os* kaj ke la korektaj tradukoj estas: mi telefonis, mi telefonos. Ili ĉiam vidas en la frazo du verbojn kaj ili volas havi ilin ankaŭ en la traduko.

Tre oftaj fontoj de eraroj estas homonimaj formoj en la ĉeĥa lingvo. Ekzemple la verbo *(ĝi) estas* kaj la akuzativaj pronomoj ĝin, ilin havas homoniman formon (ĉeĥe: *je*), kio rezultigas tradukojn mi vidas estas anstataŭ *mi vidas ĝin* aŭ mi vidas ilin. Homonimaj estas ankaŭ la prepozocio *kun* kaj la refleksivo si (ĉeĥe: *se*), tial aperas tradukoj li lavis kun, ŝi kombis kun anstataŭ *li lavis sin, ŝi kombis sin*.

Multaj eraroj estiĝas simple tial, ĉar la kursanoj ne scias distingi unuopajn kazojn kaj verbajn tempojn. Tre multaj kursanoj tradukas volitivon kiel prezencon aŭ inverse, kaj la akuzativon ili disŝutas en frazo laŭhazarde, esperante, ke ĝi eble falos sur la ĝustan lokon. Tio montras, ke ili ne komprenas ĝian uzon. Ne malmultaj estas ankaŭ tiuj, kiuj ne komprenas derivaĵojn, eĉ ne vortospecojn (ekzemple: amika, amiki, amikeco, amikaro ktp.). Substantivojn ili tradukas kiel adjektivojn, adjektivojn kiel verbojn, verbojn kiel substantivojn, ili ne komprenas signifon de la prefiksoj kaj sufiksoj ktp.

Simple dirite, al ĉi tiuj personoj mankas gramatika pensado. Ili ne kapablas ellerni sufiĉe bone la gepatran lingvon, tiom malpli fremdan. Tamen ŝajnas al mi, ke ĉe la lernado de aliaj fremdaj lingvoj oni ne renkontiĝas kun similaj problemoj en tia grado kiel en Eo. Mi meditis pri tio kaj serĉis la kaŭzon, kaj ŝajnas al mi, ke mi trovis ĝin. Niaj lernolibroj ĝenerale volas eluzi la facilecon de Eo por rapida instruado. La gramatikaj reguloj estas vere simplaj, sed nur por tiuj personoj, kiuj kapablas kompreni ilin kaj ilian uzon. Sed kiel mi konstatis ĉe instruado de skribaj kursoj, plejparto de kursanoj ne kapablas tion. Por ili poste fariĝas Eo pli malfacila ol aliaj fremdaj lingvoj, en kies lernolibroj ĉiuj reguloj estas klarigitaj multe pli detale kaj ekzercataj multe pli longe.

Por tiuj homoj ni bezonus lernolibrojn skribitajn simile kiel la lernolibroj de la germana (ekzemple), en kiuj ĉiuj derivaĵoj, eĉ la plej simplaj (*amiko — amika*), estus prezentataj al la kursano kiel pretaj vortoj, ne kiel derivaĵoj. Do la lernolibro ne postulus, ke la kursano mem formu novajn vortojn per finaĵoj kaj afiksoj, ĉiujn vortojn li ricevus pretaj. Lia atento povus plene dediĉiĝi al la problemoj de deklinaciado kaj konjugaciado, kiu devus esti tre detale komparata kun la ĉeĥa, por ke la kursano perfekte komprenu kiel traduki tiun aŭ alian gramatikan formon. Nur kiam estos sufiĉe bone ekzercitaj la konjugacio kaj deklinacio kaj kiam la kursanoj konos multajn pretajn derivaĵojn kaj kunmetaĵojn, nur tiam eblos klarigadi al ili, kiamaniere ĉi tiuj vortoj deriviĝis. Tiamaniere eblos faciligi, kvankam longigi la instruadon de Eo. Al inteligenta homo sufiĉas diri, ke la preterito formiĝas per la finaĵo -is kaj li scias ĝin korekte uzi. Al primitivulo tio ne sufiĉas, ĉar li unue ne scias, kio estas la preterito, due li ne scias ĝin ĉiam distingi en la ĉeĥa frazo disde la kondicionalo, kiu havas similan formon, trie li ne povas longe kompreni, ke li ne traduku la helpverbon. Kvare li ofte ne komprenas, kien alglui la finaĵon (*mi telefoniis, miis*

telefoni). Tial al inteligenta homo ŝajnas Esperanto lude facila, dum al primitivulo terure malfacila. Niaj lernolibroj estas verkataj por la unua grupo, sed plejparto de esperantistoj bezonus lenolibron por la dua grupo — sed tiu al ni tute mankas.

Certe vi jam rimarkis, ke la polemikaj artikoloj de kolegoj Schnell, Golden kaj Malovec iel rimas unu al la alia: longa propra sperto instigas ilin fari kritikan analizon pri la situacio de E-instruado kaj tiri praktikajn konkludojn ekz. pri la speco de lernolibro, kiun ni bezonas. Spertoj kaj opinioj diversas — ni ĝojus, se ankaŭ vi eldirus vian vorton en la debato. — la red.

PRI AKADEMIAJ ESPLOROJ KAJ INSTRUADO EN BAD SAAROW

De la 27-a de aprilo ĝis la 2-a de majo 1990 denove okazis grava seminario en la gastodomo de E-Asocio en Kulturligo de GDR, en Bad Saarow.

Kolektiĝis 37 fakuloj el la akademia sfero por trakti per 24 prelegoj la temon „Eo — objekto de akademia esplorado kaj instruado". La partoprenintoj venis el Bulgario, GDR, FRG, Japanio, Hungario, Pollando, Rumanio kaj Soveta Unio. Aparte interesa estis la prezento de la rumana akademia modelo, krei E-movadon en nacia skalo, prezentita de prof. F. Bociort, prezidanto de la nove fondita Rumana E-Asocio.

D. Blanke

PRI KOMUNA EŬROPA DOMO EN SENSENSTEIN

La grandtradicia Internacia Festivalo okazos ĉi-jare de la 27a de dec. 1990 ĝis la 3a de jan. 1991 apud la germana urbo Kassel, en Sensenstein. Ĝi prezentas specifan programon por mezaĝuloj kaj junaj familioj kun aŭ sen infanoj, sed ankaŭ gejunuloj estas bonvenaj. Ĝi okazas paralele (sed ne samloke) al la junulara aranĝo Internacia Seminario (IS).

Pri la kadra temo KOMUNA EŬROPA DOMO kaj pri aliaj temoj okazos prelegoj kaj diskutrondoj (kontribuemuloj antaŭkontaktu la organizantojn). IF alparolas ĉefe *parolantajn* gee-istojn, sed por komencantoj ĝi antaŭvidas kursojn. Infanoj ĝuos apartan programon kaj prizorgadon. Krom interesaj vesperaj programoj okazos silvestra balo kun bufedo kaj tuttaga ekskurso al historiaj urboj de GDR. La dormoĉambroj estas 2-6-litaj, disponeblas saŭno, naĝejo kaj gimnastikejo. Partoprenkotizoj estas, post la 30a de nov., 150 DM por 2-13-jaruloj, 250 DM por 14-24, 350 DM por pli aĝaj.

Sendu aliĝon al: Hans-Dieter Platz, Maikammerer Str. 21, D-W-6731 St. Martin, Germanio (tel. 06323/5982).

Kroma organizanto: Bob Venhuizen, Den Uylsingel 2, NL-3066 TD Rotterdam, Nederlando (tel. 010/4567496).

PRINCIPA REGULARO DE LA SUPERA NIVELO DE LA INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE ILEI/UEA

Artikolo 1: Celoj

La Supera Internacia Ekzameno de ILEI/UEA atestas kapablon senerare kaj bonstile uzi la internacian lingvon Esperanto je supera nivelo, skribe, parole, aŭskulte, lege kaj interparole en la plej variaj kuntekstoj, konforme al la supera postularo kaj lernoprogramoj eldonitaj de ILEI/UEA. Ili krome atestas fundajn konojn pri la historio kaj nuna stato de la Esperanto-komunumo, pri ĝia kulturo kaj pri la evoluo de ĝia literaturo.

Artikolo 2:
Supera Ekzamena Komisiono

a) La administrado de la Superaj Internaciaj Ekzamenoj okazas sub la gvido de Supera Ekzamena Komisiono (SEK), konsistanta el senlima nombro da personoj, ĉiuj kun ekzamen-rajto. Komisionanoj devas mem altgrade posedi la supre skizitan sperton pri Esperanto kaj meritojn kiel aplikantoj de la lingvo. Ilin aprobas la Komitato de UEA laŭ proponoj de SEK, kiu konsultas unue kun la Estraroj de UEA, de ILEI, kaj kun aliaj kompetentaj instancoj, kiuj rajtas ankaŭ fari proponojn al SEK.

b) SEK havas kvin-personan estraron konsistantan el prezidanto, vicprezidanto, sekretario, vic-sekretario kaj kasisto, elektitajn de la SEK-anoj inter si. Kaze de fondo aŭ retiriĝoj la Estraro de ILEI rajtas provizore nomi estraranojn. La servoperiodo de la komisiono estas trijara. Komisionanoj estas reelekteblaj. La sekretario de SEK ĉiun trian jaron submetas liston de la komisionanoj kaj estraranoj por la nova periodo al la supre nomitaj organoj por aprobo.

Artikolo 3: Enhavo de la ekzamenoj

a) La ekzamenoj estas unulingvaj, t.e. nur en Esperanto, escepte en la kazo de tradukaj taskoj. Ili konsistas el deviga gramatika/leksika antaŭtesto, anticipe pretigita referaĵo, skriba kaj parola partoj. La temo kaj amplekso de la referaĵo devas esti anticipe interkonsentita — kutima amplekso estas inter 15 kaj 20 paĝoj. La referaĵo devas esti defendata en la parola parto de la ekzameno, kiu estas publika.

b) SEK decidas pri la formo kaj enhavo de la ekzamenoj kaj rajtas ŝanĝi ilin surbaze de spertoj kaj pliaj konsideroj. Uzitaj ekzamen-testoj estas publikigataj kiel gvidiloj por estontaj kandidatoj.

Artikolo 4:
Starigo de ekzamena sesio

a) La Superaj Ekzamenoj estas normale proponataj ekster la kadro de UK, sub la administra gvido de Landa Asocio de UEA, Landa Sekcio de ILEI, de internacia aŭ regiona Esperanto-centro aŭ alia institucio, kaj sub la faka gvido de tripersona ekzamena komisiono (EK).

b) La estraro de SEK, konsulte kun la prezidanto de ILEI, devas skribe aprobi la lokan administran institucion, la lokon kaj daton de ekzamenado kaj decidi la konsiston kaj prezidanton de EK, konforme al la temo(j) de la defendota(j) referaĵo(j).

Artikolo 5: Devoj de SEK

a) Pristudi ĉiujn problemojn rilate al la organizado de la Superaj Ekzamenoj.

b) Disponigi sin por surloke ekzameni laŭ fizikaj eblecoj kaj faka kompetenteco kaj, kaze de lastmomenta malhelpo ekzameni, tion senprokraste komuniki al la sekretario de SEK.

c) Laŭeble kaj laŭ komisio helpi la estraron de SEK plenumi siajn taskojn.

Artikolo 6:
Devoj de la estraro de SEK

a) Ellabori regularojn, programojn, postularojn, specimenajn testojn kaj ĉiujn necesajn dokumentojn.

b) Verki sufiĉajn tekstojn por la organizotaj ekzamen-sesioj, konforme al la postuloj de la superaj lernoprogramoj de ILEI/UEA.

c) Prizorgi la konsiston kaj fakan kompetentecon de SEK en diversaj terenoj per laŭperiodaj aŭ laŭbezonaj nomigoj kaj prizorgi la enkondukon kaj spertiĝon de novaj ekzamenantoj, tiel ke konsekvencaj ekzamenaj normoj estu gardataj en ĉiu ekzamena sesio.

ĉ) Konsistigi ĝustatempe lokan ekzamenan komisionon por ĉiu organizota ekzamen-sesio kaj certigi, ke la prezidanto de EK ricevu la uzotajn ekzamenajn testojn, instrukciojn kaj atestilojn.

d) Teni zorgan registradon de ĉiuj ekzamenaj reguloj.

e) Funkcii kiel apelacia instanco en kazo de ekzamena kontestado, aŭ de rifuzo de referaĵa temo. Se membro de SEK estas samtempe unu el la surlokaj ekzamenantoj, la apelacia instanco estas la Estraro de ILEI.

f) Prezenti protokolon ĉiujare al la Estraroj de ILEI kaj UEA pri la rezultoj kaj laŭbezone raporti pri la farita laboro.

g) La estraro de SEK dividas inter si la taskojn. Se eble, ili kunsidu unufoje en la jaro.

Artikolo 7 : Devoj de la Ekzamena Komisiono (EK)

a) Antaŭ la ekzamena sesio EK prijuĝas la ricevita(j)n referaĵo(j)n.

b) La prezidanto de EK ricevas la ekzamenajn testojn kaj malfermas ilin tuj antaŭ la ekzameno mem en la ĉeesto de la ekzamenotoj.

c) Post ĉiu ekzamena parto, EK, sub la gvido de la prezidanto, kontrolas kaj pritaksas aparte la antaŭtestajn, skribajn kaj parolajn respondojn. Surbaze de tiuj notoj, kaj la prijuĝo de la referaĵo, EK aljuĝas la finajn notojn por la atestiloj.

ĉ) La prezidanto de EK senprokraste resendas al la sekretario de SEK subskribitan ekzamenan protokolon kune kun la skribitaj ekzamen-testoj.

Artikolo 8: Deziro pri ekzamenado

a) Individuo, kiu volas kandidatiĝi, devas anonci sin al la sekretario de SEK indikante la deziratan temon por sia referaĵo kune kun ĉ. 200-vorta resumo de ĝia enhavo kaj la deziratajn lokon kaj daton de ekzamenado.

b) Instanco, kiu deziras proponi organizadon de la Supera Ekzameno devas skribe peti tion de la sekretario de IEK almenaŭ ses monatojn antaŭ la dezirata okazigo de la Ekzameno, kune kun listo de la antaŭvidataj kandidatoj kaj la supre menciitaj informoj por ĉiu.

c) La estraro de SEK rajtas malakcepti proponitan referaĵ-temon aŭ insisti pri ĝia modifo.

ĉ) La sekretario de SEK provas trovi ekzamenantojn por la petitaj sesioj, el inter ili minimume unu devas altgrade kompetenti pri la proponita temo de la referaĵo; tiu funkcios kiel konsilanto al la kandidato dum la verkado. Se tiu kaj ĉiuj aliaj kondiĉoj estas plenumitaj, la sekretario skribe akceptas la proponon de la kandidato kaj interkonsentas pri datoj kaj lokoj por la antaŭtesto kaj ekzamenado.

d) La referaĵo devas atingi la nomitan konsilanton ses semajnojn antaŭ la ekzamena sesio; tiu prijuĝos ĝin kune kun la aliaj EKanoj, kaj eventuale kun aliaj fake kompetentaj SEKanoj.

Artikolo 9: Notoj kaj atestoj

a) Sukcesa ekzamenito ricevas atestilon enhavantan la finan noton kaj la temon de la sukcese defendita referaĵo, subskribitan de la prezidantoj de ILEI, SEK kaj EK.

b) La fin-nota sistemo estas kvarŝtupa kaj esprimita jene: tre bone – bone – kontentige – malsukcese.

c) Kandidatoj ricevintaj la noton „malsukcese" ne ricevas de EK atestilon, sed personan sciigon pri tio. Ili rajtas rekandidatiĝi post ses monatoj.

Artikolo 10: Financoj

a) La kasistoj de ILEI kaj SEK ellaboras ĉiujare buĝeton, kiun ili submetas al la financa fako de UEA. Ili fine de ĉiu jaro kompilas finkalkulon, kiun ili simile prezentas.

b) La spezoj pri la ekzamenoj estas registritaj en ekzamena konto, kiun prizorgas la kasisto de ILEI.

c) Ekzamenotoj devas pagi ekzamenan kotizon, egalan al unu MA-kotizo de UEA por la loĝlando de la kandidato. EK raj-

Jubilea Konferenco

25a INTERNACIA KONFERENCO DE I.L.E.I.


(Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)

VOSS Folkehögskule / VOSS Turistheim

(La Popolaltlernejo/turisthejmo de Voss)

NORVEGIO

3 - 8 aŭgusto 1991



Kadrotemo de la konferenco:

"Tyresö, Rauma kaj nun ...?"

Strategio kaj principoj por la instruado kaj antaŭenigo de la Internacia Lingvo

Antaŭ dudek jaroj la Internacia Junulara Kongreso naskis deklaracion en sveda urbeto, kies esenco estis "engaĝismo". Dek jarojn poste en la finna urbo Rauma, la IJK akceptis manifeston, kiu kritikis la pracelon, ke Esperanto estu dua lingvo por ĉiu kaj vokis por kreado de kulturaj valoraĵoj pere de la lingvo.

Nia celo estas ekzameni la sekvojn kaj nuntempan trafecon de tiuj proklamoj kaj provi formuli novajn imperativojn por la naŭdekoj, surbaze de pozitivaj ideoj ene de ili, kaj el nia propra sperto kiel instruistoj. Aparte taŭgas nun fari tion pro la fakto, ke niaj konferencoj atingis jubileon, kaj ni kunvenas en tiu Nordio, kiu naskis tiujn pli fruajn dokumentojn, antaŭ dek kaj dudek jaroj.

Aliĝadreso: M. Jones, 41 Causeway, Chippenham, Wiltshire, SN15 3DD, Anglujo. — Tel. 0249/656041.

La loko

Voss situas proksimume 100 km nordoriente de la UK-urbo Bergeno ĉe la ĉefa fervojo inter Oslo kaj Bergen. Voss estas lerneja, kultura kaj turista centro. Voss situas ĉe la lago Vangsvatnet ĉirkaŭata de belaj montoj. Ŝnurveturiloj kondukas al kelkaj montpintoj.

La konferencejo

Vintre la konferencejo funkcias kiel popolaltlernejo kaj somere kiel turista hejmo.
La konferencejo disponas pri:
- *salono kaj klasĉambroj por niaj kunsidoj;*
- *1-, 2- kaj 3-litaj ĉambroj;*
- *varma kaj malvarma akvo en ĉiu ĉambro;*
- *apartaj duŝejoj.*

La distanco inter la konferencejo kaj la fervoja stacidomo estas 1,3 km.

Kotizoj

La prezoj inkluzivas:
- *5 tranoktojn;*
- *matenmanĝon kaj du manĝojn tage;*
- *la konferencan programon (ekskurso aparte pagenda).*

unulita ĉambro:	*520 NLG (guldenoj)*
dulita ĉambro:	*420 NLG*
trilita ĉambro:	*355 NLG*

Pri parta partopreno aŭ aliaj aranĝoj koncerne tranoktadon ktp. bonvolu kontakti la kasiston de ILEI antaŭ la 1-a de majo 1991: Bertil Andreasson, Södra Rorum pl.455, S-242 94 Hörby, Svedio. — Tel. 0415/50152.

Bonvolu elekti la por vi plej taŭgan pagmanieron:

a. *al la kasisto de ILEI: poŝtĝirkonto 68 21 17 - 7 je nomo "La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj - ILEI", Södra Rörum pl.455, S-242 94 Hörby, Svedio;*
b. *per ĉeko al la sama adreso (aldonu 10 guldenojn por bankkostoj);*
c. *al UEA (pĝk 378964), indikante "por la 25a ILEI-konferenco" (kodo «ilek-a»), UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;*
ĉ. *aliĝontoj el netranspagipovaj landoj bonvolu kontakti la kasiston de ILEI por informoj. Aliĝu nun provizore.*

Pliaj informoj

IPR kontinue informos pri la konferenco en la venontaj numeroj. — Aliĝintoj ricevos pli detalajn informojn pri la programo, la trajna horaro, vojaĝeblecoj ktp.

Ekzamenoj

La elementaj kaj mezaj ekzamenoj de UEA/ILEI estos kompreneble ofertataj en la Universala Kongreso, sed se estas sufiĉa interesiĝo, ni povos proponi ilin ankaŭ en la ILEI-Konferenco. Pliajn informojn pri la ekzamenoj vi trovos en la eldonita libreto (6,60 gld. ĉe UEA). La ekzamenkotizo varias laŭlande de 25 ĝis 40 guldenoj. Kiu volas kandidatiĝi, bv. indiki tion sur la aliĝilo.

Cseh-seminario

Kadre de la ILEI-Konferenco, Internacia Esperanto-Instituto (IEI), kunlabore kun ILEI, okazigos Ĉe-seminarion por estontaj Cseh-instruistoj, kiuj plenumos ĉiujn partoprenkondiĉojn, nome: sukcesajn partoprenojn en seminarioj A kaj B, gvidadon de tuta Cseh-metoda kurso, raporton pri ĉi tiu al IEI antaŭ 1991-05-01. La partopreno estas aparte pagenda al IEI. Pliaj informoj haveblas de: IEI, Riouwstraat 172, NL-2825 HW Den Haag, Nederlando. Se eble, bonvolu aldoni al via informpeto internacian respondkuponon.

ALIĜILO

Mi aliĝas al la 25a Konferenco de ILEI en Voss je 3-8 aŭgusto 1991.

Familia nomo ..... Antaŭnomo .....
Profesio ..... Naskiĝdato ..... Sekso .....
Strato ..... n-ro .....
Poŝta kodo ..... Loĝloko ..... Lando .....
Subskribo .....

Bonvolu krucsigni

Mi mendas ĉambron unulitan ☐ / dulitan ☐ / trilitan ☐ kaj deziras loĝi kun ..... kiu ankaŭ aliĝas.
Mi manĝas vegetare: jes: ☐ ne: ☐
Mi sekvas la jenan dieton:
Mi partoprenos la Cseh-seminarion C kaj jam pagis al IEI ☐
sed ne pagis al IEI ☐
Mi intencas partopreni la krompagendan ekzamenon elementan ☐
mezan ☐
Aliaj deziroj .....
La kotizon de ..... guldenoj mi pagis je dato .....
per maniero a. ☐ b. ☐ c. ☐ ĉ. ☐.
Mi intencas partopreni en la Universala Kongreso en Bergen
jes ☐ ne ☐
Dato ..... Subskribo .....

Spaco rezervita al LKK

La aliĝilo alvenis je ..... Aliĝnumero .....
La pago alvenis je ..... Sumo .....
Ankoraŭ pagendas .....
Ĉambronumero ..... kun .....

tas decidi pri modifo de la kotizo en apartaj cirkonstancoj. Kaze de malsukceso en la antaŭtesto aŭ la skriba prijuĝo de la referaĵo 80% de la kotizo estas repageblaj.

ĉ) Buĝete antaŭviditaj elspezoj de SEK-anoj kaj EK-anoj estas kompensitaj el la ekzamena konto.

Artikolo 11: Aliro al Ekzamenoj

a) Posedo de la Meza Ekzameno de UEA/ILEI estas normala antaŭkondiĉo por kandidatiĝi por la Supera Ekzameno. Tamen en apartaj kazoj SEK rajtas liberigi kandidaton de tiu devo.

b) La gramatik-leksika antaŭtesto estas deviga por ĉiu kandidato kaj povas esti plenumita sub ekzamenaj kondiĉoj iam ajn inter la akcepto de la referaĵa temo kaj 6 horoj antaŭ la ekzameno mem.

c) Sukceso en tiu antaŭtesto kaj sukcesa prijuĝo de la skribita formo de la referaĵo estas antaŭkondiĉoj por eniri la ekzamenon mem. Kandidato malsukcesinta en tiuj taskoj rajtas rekandidatiĝi post tri monatoj.

ĉ) ILEI okazigas preparajn kursojn lige kun la ekzamenoj, sed tiuj estas nedevigaj.

Artikolo 12: Rekonoj

SEK rajtas decidi, post konsultiĝo kun UEA kaj ILEI, ke difinitaj universitataj diplomoj por Esperantaj kursoj estu rekonitaj kiel ekvivalentoj de ĉi tiu supera ekzameno.

Artikolo 13: Organiza Regularo

Ĉi tiun principan regularon suplementas organiza regularo, kiu precizigas la disdividon de taskoj ene de SEK, la poento-donadon kaj formon de la ekzamenaj testoj kaj aliajn administrajn procedurojn.

Ĉi tiun proponon por Supera Ekzamena Regularo verkis S. MacGill en apr. 1990. Ĝi estis poste modifita laŭ komentoj de Claude Gacond kaj Zsuzsa Barcsay, kaj distribuita al la Estraro de ILEI, la membroj de IEK, s-ino Irena Szanser, s-ro Ian Jackson (komisiito ĉe UEA pri regularoj) kaj la CO de UEA en majo. Tamen, UEA ne distribuis ĝin al sia Komitato. Ĝi estis montrita al la partoprenantoj en Hanabanilla, kiuj ne proponis modifojn. La CO promesis antaŭmeti ĝin al siaj kompetentuloj (ekz. tiuj, kiuj funkciigis la antaŭajn ekzamenojn). Escepto al la supra procedo estas la artikolo 12, kiu estas nove aldonita.

Ni nun submetas ĝin al la membraro de ILEI por siaj komentoj antaŭ ol poŝte voĉdonigi nian Komitaton pri ĝi jarfine.

Sendu viajn komentojn al nia komisiito pri la supera ekzameno, s-ino Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25B, H-1011 Budapest, Hungario, aŭ al via sekciestro, kiu estas sam tempe via ILEI-komitatano.

Formo de la ekzameno

Ni aldonas niajn nunajn imagojn pri la formo de la ekzameno. Ili estas je malpli fiksita stadio ol la regularo, sed ni aperigas ilin cele al publika diskuto. Sekvos postularo kaj rekomendata lego-listo.

Deviga skriba antaŭtesto:

Tio havos leksikan parton, kun demandoj kiaj:

Klarigu la sencan similecon inter la vortoj *procezo*, *proceso* kaj *procedo*, kaj la precizan senco-diferencojn.

Kategoriigu kaj difinu la sekvajn fak-vortojn: *eĥidno, kapriĉo, ofseto, robajo, sintri, takelo, paletro.*
Difinu kaj kritiku la Esperantajn radikojn: *levistik-, forfikul-, primar-, rezon-*
Prikomentu la etimologion kaj gramatikan kategorion de la radiko *parker-*.
Ĝi havos gramatikan parton, kun demandoj kiaj:
Klarigu koncize la refleksivon en Esperanto, donante regulojn kaj ekzempligajn frazojn. Traktu la kazon, kiam A petas B plenumi sian/lian taskon.
Priskribu kaj ekzempligu la funkciojn de la finaĵo -N en Esperanto.
Klarigu, kial ni diras *broso* kaj *martelo* sed *rastilo* kaj *segilo*. ... Ktp...

Disertacio:

La kandidato proponas temon, SEK devas aprobi ĝin kaj trovi docenton, kiu gvidos la kandidaton kaj poste prijuĝos ĝin (vidu la regularon). Plejofte estos eseo, sed povus esti beletra verko, faka teksto aŭ dudirekta tradukaro. Devas esti lingve senriproĉa kaj prezentu adekvatan bibliografion!

Skriba parto (3-hora):

Kandidato ricevos komence de la ekzameno 10 ĝis 15 temojn, almenaŭ po du en la sekvaj kategorioj:

- lingvistiko, interlingvistiko
- historio kaj nuntempo de la E-komunumo kaj -movado.
- Esperanta literaturo
- Lingvaj situacioj kaj problemoj en la mondo
- Praktika aplikado de Esperanto (inkl. ĝia instruado).

La kandidato elektu kvin el la demandoj, unu el ĉiu temo. Pri kvar el ili ŝi/li verku ĝis unu paĝon (po 20 minutoj). Pri la kvina verkendas eseo sur 3 ĝis 4 paĝoj (90 minutoj). Notoj, vortaroj kaj helpiloj ne permesataj.

Parola parto (ĉ. unu-hora):

Tio estos tri-parta (po ĉ. 20 minutoj), kaj estos publika.

- **Disertacio:** Parola defendado.
- **E-Kulturo:** La kandidato anticipe liveru kvin temojn pri la Esperanta kulturo en plej vasta senco. Duonhoron antaŭ la parola ekzameno la ekzamenantoj elektos unu el la kvin; la kandidato devos fari 10-minutan prezentaĵon de tiu temo kaj poste diskuti kun la ekzamenantoj.
- **Aplikado:** La kandidato interkonsentu anticipe kun la ekzamenantoj pri preciza temo, el unu el la sekvaj kategorioj:

  – fari gvidon tra konata muzeo, aŭ
  – doni informojn pri geografia regiono, aŭ
  – klarigi, kiel funkcias maŝino aŭ procezo, aŭ
  – klarigi, kiel oni plenumas difinitan nesimplan taskon.

La kandidato tion klarigas dum 10 minutoj kaj poste respondas demandojn de la ekzamenantoj.

Projekto produkti vid-bend-serion kun Esperanto-kurso por komencantoj, por uzo de televidstacioj

Mila v.d. HORST-KOLINSKA, Nederlando

La ideo produkti tian vid-bend-serion naskiĝis samtempe en kelkaj lokoj. Tio signifas, ke la situacio maturiĝis por fari konkretajn paŝojn koncerne realigon de ĝi.

Tiucele dum la 75-a UK en Havano okazis unua kunveno (momente de nur kvar personoj) kiuj pretas serioze esplori kaj aktive kunlabori por realigi ĝin. La personoj estis: Venezuela Esperanto-Asocio (VEA): prof. J. Bachrich; Hispana Esperanto-Asocio (HEA): s-ro J. Azcuenaga Vierna; Kuba Esperanto-Asocio (KEA): J. Castillo kaj IEI (Internacia Esperanto Instituto): Mila v.d. Horst-Kolinska.

S-ino v.d. Horst-Kolinska prezentis al la kunvenintoj jam pretan projekton de scenaro por 1-a leciono laŭ instrumaterialo *Kurso de Esperanto* laŭ aŭdvida struktura metodo de Antonije kaj Tibor SEKELJ. La scenaro estis preparita kunlabore kun pola aktorino Jadwiga GIBCZYNSKA, ĉi-jare (1990) aprile en Pollando kaj sendita al Dana Esperanto-Asocio pere de adreso de s-ro St. Mielczarek por aprobo kaj eventuala realigo. La projekto realigi vid-bend-serion por televidstacioj naskiĝis en 1989 dum prelegvojaĝo de s-ino v.d. Horst-Kolinska tra Danio. Tiam estis interkonsentite, ke DEA (kiu tiucele posedas monrimedojn) kunlabore kun IEI produktu ĝin. Tamen ŝajnas, ke tiu projekto (laŭ letero ĵus ricevita el Danio) estas ne plu reala (almenaŭ laŭ la opinio de s-ro Mielczarek). Mi tamen atendos la reagon de Dana Esperanto-Asocio mem.

Dum la kunsido en Havano la kvar reprezentantoj opiniis, ke la prezentita instrumaterialo pro sia internacia karaktero de temoj kaj bonhumoro taŭgas por uzi ĝin tiucele. Ĝi estas jam en multaj landoj konata kaj efike praktikata.

La instrumaterialo ekde la jaro 1986 estas posedaĵo de IEI. Por pli efike uzi la materialon, IEI produktis diapozitivojn kaj sonbendkasedon, sur kiu la tekstojn legas parolistoj de Radio Polonia, redaktoroj A. Pettyn kaj B. Pietrzak.

Dum la kunsido en Havano estis interkonsentite, ke:

1. reprezentantoj de VEA, HEA kaj KEA konatiĝos pli detale kun la proponita instru-materialo; konsultos lokajn pedagogojn rilate ĝian metodiko-didaktikan valoron kaj sugestojn sendos al IEI en Hago, Nederlando (vidu

sube). Tiu adreso estis elektita kiel provizora kontakt-adreso ĝis kiam la tuta projekto estos preta por efektivigi ĝin.

2. S-ro J. Castillo esploros la eblecojn kaj kostojn de la produktado en Havano.

3. S-ino M. v.d. Horst-Kolinska prezentos informcele la temon dum ILEI-konferenco en Hanabanilla akceptante eventualan kunlaboron.

4. S-ro Castillo provos kontakti filmiston, kun kiu oni povus pritrakti la instru-materialon post reveno de Hanabanilla. La materialon liveros s-ino M. v.d. Horst-Kolinska.

La materialon mi liveris, sed la promesita filmisto ne aperis, kvankam mi havis tutan posttagmezon liberan. Unu el la ŝancoj estis perdita. Mi do atentigas, ke estonte ni pli efike uzu nian tempon.

Aldonaj informoj

Dum ILEI-konferenco mi prezentis la temon, sed kiel kutime, nenia reala apogo aŭ propono aperis. La sola reago estis: „de kie vi prenos la monon por realigi tiom multekostan projekton". Ĝi estis tipa reago de nia E-medio. Mi devas konfesi, ke mi ankaŭ ne atendis pli, kvankam mi tamen atendis ian reagon rilate la proponitan instru-materialon, kiu ja devus esti konata al E-instruantoj, sed ŝajnas, ke ne, ĉar eĉ tiu reago ne venis, kvankam oni daŭre parolas pri manko de internacia instru-materialo. Mian opinion pri tiu temo vi povas legi en IPR 1990/2, p. 15.

Mi ankaŭ kontaktis vic-prezidanton de UEA s-ron Roman Dobrzynski, kiu mem estas reĝisoro, ĵurnalisto kaj filmisto. Ni interkonsentis, ke ankaŭ de li IEI ricevos informojn koncerne produkt-kostojn en Pollando.

Resume:

La unuaj paŝoj por efektivigi la projekton estis entreprenitaj. Tiuj paŝoj pro diversaj kondiĉoj estas provizoraj, sed ni esperu, ke „ĵetitaj semoj trafis al fekunda grundo kaj alportos fruktojn".

Ĉu ni kapablos uzi niajn internaciajn eblojn por realigi la celon, montros baldaŭa estonteco.

Mi do atendas promesitajn diversajn informojn, sed mi petas, ke ili estu konkretaj. Miaflanke mi promesas, ke se la supre menciita instru-materialo estos akceptita por tiu vid-bend-serio, mi kunlaboros por prepari scenarojn por apartaj lecionoj, laŭ metodiko-didaktika vidpunkto, ĉar dum kelkaj jaroj mi instruis laŭ ĝi kun tre bonaj rezultoj.

Membroj de ILEI, kiuj volus esprimi opinion pli pozitivan ol tiu kritike menciita, aŭ volas kunlabori, bv. skribi al IEI, Riouwstr. 172, NL-2585 HW Den Haag. La estraro de ILEI atendas konkretan proponon, ĉar eĉ ne ĉiuj estraranoj ĉeestantaj en Hanabanilla povis ĉeesti la aluditan prezenton. - La red.

INTERKONSENTO INTER UEA KAJ ILEI

La ĉi-suba interkonsento estis aprobita de la komitato de ILEI poŝte, de la UEA-komitato en Havano kaj sekve nun validas paralele kun la fakto, ke ILEI estas denove aliĝinta faka asocio en UEA.

Universala Esperanto-Asocio (UEA), la ĉefa kunordiga organizaĵo por e-istoj kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), la faka asocio pri instruado interkonsentas jene:

1. UEA komisias al ILEI la plenumon de sia internacia eduka laboro, tio estas ĉiaj agadoj por altigi la lingvan kaj kulturan nivelon de la E-parolantoj (i.a. ekzamenoj), por disvastigi la instruadon de la internacia lingvo ĉiunivele kaj por rilati kun edukaj instancoj tiucele.

2. Farinte tion, UEA establis kun ILEI aparte intiman kaj proksiman ligon, kion spegulas la kunlaboraj interrilatoj inter la du organizaĵoj.

3. ILEI regule informas UEA pri siaj agadoj kaj atingoj; la periodaĵoj kaj rimedoj de UEA estas malfermitaj al ILEI por disvastigi tiujn atingojn kaj fari alvokojn al la membraro de UEA. La revuo kaj kursmaterialo de ILEI estas simile malfermitaj por raporti pri la agado kaj aranĝoj de UEA. La organizaĵoj kunlaboras proksime en kampoj de komuna intereso, kaj eventuale reciproke nomas komisiitojn.

4. Cele al reciproka informfluo, ĉiu organizaĵo rajtas nomi observanton ĉe la estrarkunsidoj de la alia: tagordoj kaj protokoloj de ĉiuj estrarkunsidoj estas interŝanĝataj en du ekzempleroj. Laŭeble okazu komuna estrarkunsido en la UK.

5. UEA kaj ILEI interkonsiliĝas fiksonte datojn de kongresoj, estrar- kaj komitatkunsidoj, k.s. por ke ili ne koliziu.

6. UEA senpage disponigas en la UK salonojn por la internaciaj ekzamenoj, la Tago de la Lernejo kaj la faka kunsido de ILEI, adekvataj al la bezonoj kaj eblecoj. UEA krome laŭnecese disponigas dum la UK senpagan budon, kie ILEI povu prezenti sian laboron kaj varbi membrojn. Siavice, ILEI senpage disponigas al UEA tempon kaj lokon en la ILEI-konferencoj por sinprezento aŭ similcela elpaŝo.

7. En kazo de komunaj eldonaĵoj, UEA kaj ILEI fiksas komunan guldenan vendoprezon.

8. ILEI, fine de ĉiu kalendara jaro, dokumentas siajn financajn bezonojn por la venonta jaro. La estraro de UEA, en la kadro de la buĝeto, prezentas tiun peton al la Komitato kaj agas laŭ ĉi ties decidoj.

9. Konklude, ambaŭ organizaĵoj respektas kaj la statutajn celojn kaj la memstarecon de la alia. Ĉi tiu interkonsento ne malhelpas kunlaboron kaj interkonsenton en terenoj ne menciitaj ĉi tie.

10. La interkonsento ekvalidas post akcepto flanke de la du komitatoj, kaj restas senlime valida. La Komitato de UEA aŭ ILEI rajtas malvalidigi ĝin, doninte tri monatojn da averto pere de la estraro de la alia organizaĵo.

Julio, 1990.

Estu amiko al Juna amiko!

Nun kiel neniam antaŭe, la lernejana revuo *Juna amiko* bezonas fidelajn amikojn kaj legantojn. Multaj novaj abonantoj en pagipovaj landoj por 1991 helpos al ĝi travivi la severajn ekonomiajn ŝanĝojn en Hungario. Perantoj en dudeko da landoj akceptos abonojn (unuopajn aŭ grupajn por klasoj) en via loka valuto. Dek guldenoj ĉe UEA por kvar numeroj: aerpoŝta ekspedo al ne-eŭropaj landoj. Ideala fonto de internacia lego-materialo kaj kontaktoj por inter-klasa kaj unuopa korespondado.

Recenzoj

La ronkanta avo

Aŭtoro: André WEEKMANN
Tradukis: Edmond LUDWIG
Eldonis: Orientfranca Esperanto-Federacio, 1989.
Prezento: 28x20 15 p.
Plenpaĝa desegno vid-al-vide al la teksto, en klara preso.

Jen plaĉa libreto, ne nur infanlibro, kiu en trafa maniero montras la problemojn de la vivo en urba laborista kvartalo, kie ĉio estas griza kaj avoj ne rajtas ronki, infanoj ne rajtas esti gajaj kaj bruemaj... Kiel ĉio ĉi solviĝos dank'al kompliceco de infanoj kun Avo Klazen, kaj iom da bonvolo de kelkaj aliaj personoj, tion montras la disvolvo de la historio. Sed mi ne volas rakonti plu, ĉar la legado vere estas momento de feliĉo, kiu igas nin revi... Ne mankas ekologia noto, ankaŭ dank'al la sugestaj desegnaĵoj de Pierre Lataste.

Mi opinias, ke tiu ĉarma libro plaĉos same al la infanoj, kiel al plenkreskuloj, kiuj trovos en ĝi multon pripensindan, kaj ankaŭ interesajn konversaciajn temojn por diskuti dum aŭ post Esperanto-kurso. Ĉiu legos la libron laŭ sia kompreno, kaj ĉiu trovos ĝojon.

La lingvo estas sufiĉe klara kaj la stilo flua, sed ĉu progresintoj trovos ĝin facila? Ili ne lasu sin timigi de kelkaj kunmetitaj vortoj kaj de personaj nomoj ĝenerale ne tre kutimaj al francoj. Mi nur rimarkigas la verbajn formojn en *-intis* (Ekz. „La gepatroj veturintis ĉe onklon Fritz"). Sed mi opinias, ke mallonga klarigo sufiĉos, por ke ili ne estu problemo al progresintoj en Eo aŭ eĉ al infanoj: ili ja estas tute logikaj kaj kompreneblaj. Preseraroj preskaŭ ne ekzistas, fakte nur unu mi rimarkis: sur p. 13. „fabikroj" por *fabrikoj*.

Bonvena biografieto de la aŭtoro troviĝas sur la lasta kovrilpaĝo.

Konklude, multaj tiaj libroj, samtempe facilaj kaj interesaj kaj plurnivele legeblaj, estus dezirindaj en nia lingvo, kaj dankindaj estas la tradukinto kaj la Orientfranca Federacio, kiu eldonis ĝin.

J. GONIN



Théophile Cart:
Ni fosu nian sulkon!

Vortoj de Profesoro Th. Cart

Aŭtoroj: S. Grenkamp, R. de Lajarte;
Eldonejo: Pro Esperanto, Vieno, 1990. 140p.,
represo de la 1a eldono; 14 x 20 cm.

Unu el la plej viglaj eldonejoj estas Pro Esperanto en Vieno (Adreso: Poŝtfako 28, A-1014 Wien). Dum la lastaj jaroj ĝi eldonis dekojn da libroj kaj broŝuroj, parte originalajn romanojn, parte represojn de valoraj malnovaj libroj, sed ankaŭ instrulibrojn kaj sciencajn verkojn.

Ĉi-tiu libro estas represo de la unua eldono el la jaro 1927. Temas pri kolekto da artikoloj de profesoro Cart, kiu ludis gravan rolon en la unua periodo de Eo. Ĝi respegulas klare la argumentadon de la e-istoj en la praepoko de la internacia lingvo. Esprimoj kiel *triumfo de Esperanto*, *kunbatalanto*, *ni estos venkintaj* kaj similaj peras al ni fine de la 20a jarcento iom strangan impreson, sed estas tute "normalaj" antaŭ cent jaroj. Sed lingve la fabeloj de Cart estas, laŭ la antaŭparolo de la eldoninto magistro Mayer, "literaturaj perloj".

Walter KLAG

Paroligiloj de Stanley Nisbet

Eld: Kardo, 16 paĝoj, A5 paperbindita.
Prezo: 1 GBP por 5 ekz.

Ne nur en Britio sed ĉie multaj studentoj unue lernas E-on per koresponda kurso, kaj nur poste vizitas kurson, kie ili havas la eblon praktiki la lingvon voĉe. Por tiuj, kiuj gvidas tiajn kursojn, estas ofte malfacile trovi taŭgajn temojn por ekzerci la parolkapablon. Precize ĉi tie "Paroligiloj" estas utila.

Ĉi tie en dekses ekzercoj D-ro Nisbet donas vastan aron de temoj, per kiuj oni povas ekzercigi la studentojn. La ĉefa avantaĝo estas, ke la ekzercado estas ne nur banalaĵo, sed progresas de paŝo de paŝo. Iom post iom la temoj estas pli streĉaj, kaj la lernantoj neeviteble progresas per pligrandigo de vortprovizo, per alkutimiĝado al pli kaj pli komplika frazfarado. Ankaŭ la temoj progresas de kion ni bezonas sur dezerta insulo (kaj la aŭtoro donas liston de eblecoj) ĝis kiam en la fina ekzerco oni diskutas "Kiel eduki infanojn".

Kelkaj lecionoj estas ilustritaj per gajaj desegnaĵoj, kaj la formo varias de komencita konversacio ĝis listo de temoj por diskutado. Certe mi volas provi tiun libreton, kiam mi venonte gvidos meznivelan klason. Ĝi estus utila ankaŭ en klubo por kuraĝigi la timulojn pri konversacio.

Arnold Pitt

Sceno kun ĉefa rolulo en la fono

Zamenhof-memorvespero, Budapeŝto, Domo de Pola Kulturo. Malgranda salono, iom pli da ĉeestantoj ol sidlokoj. Familieca atmosfero inter reprezentantoj de plej diversaj generacioj. Konciza enkonduko kun profunda, aktula enhavo: Nun, kiam ŝanĝiĝas la pritakso de la postmilita periodo, kiam multaj fariĝas skeptikaj pri valoroj, ni esperantistoj ne devas honti kaj penti, ĉar nia „linio": nia ideologio kaj agado estas kaj restas valida.

Festparolo: la nocio „paco" inkludas ne nur senmilitan interhoman rilaton, sed ankaŭ protektan rilaton de homo al naturo. Ni respektu ĝin kaj nin mem. Poste venas 12–14 jaraj infanoj kaj lerte prezentas skeĉojn. Humuro, sereno, gajeco, rido post la pezaj vortoj. Aplaŭdo.

Sed la plej grava rolulo de la prezentado (aŭ de la vespero) — transdoninte sian sidlokon al staranta persono el la publiko — restas en la fono, resp. miksiĝas inter la infanojn. Ŝi zorgas pri „akcesoraĵoj" (23! florvazoj), ordigas la infanojn, flustre helpas en la teksto, do oni povus diri, ke ŝi reĝisoras. Sed kiu sidas proksime, vidas multe pli: Ŝi ekirigas la knabinojn sur la scenejon kun patrina zorgemo; per okuloj, rideto kaj kapjeso instigas ilin; ŝi travivas ĉiun rolon kaj la podian febron de ĉiu ŝia lernanto; per unu brako ŝi ĉirkaŭas la ĵus revenintan kantistineton, per la alia mano ŝi tenas la scenarlibreton kaj protekte kuraĝigas la venontan rolulon. Ŝi havas intensan psikan kontakton samtempe kun ĉ. 15 infanoj: ili ĉiuj flugas el kaj revenas al ŝia sekura, varma nesto kun brilaj vizaĝo kaj okuloj, ĉar neniun ŝi forgesas laŭdi. Tamen ŝi ne estas kiel kokino-panjo kun siaj kokidoj, ŝi ja estas moderna, juna, eleganta instruistino **kun siaj** modernaj, memstaraj lernantinoj.

Ja ankaŭ en nia moderna epoko estas la amo, kiu donas sekurecon kaj helpas nin al sukceso, ĉu sur scenejo, ĉu en la ĉiutaga vivo. Ne nur infanojn, sed ankaŭ plenkreskulojn. Tial povas resti nia ideologio, nia interna ideo en kiuj ajn politikaj cirkonstancoj valida kaj aktuala.

(Enkonduko: Jakab S., festparolo: Kereszthegyi T., skeĉoj: S. MacGill, lernantinoj: Bazgrada Lernejo de Budapest XI. Mezőkövesd str., instruistino: LENDVAY-ABAI Ágnes).

Post duono da jaro venis letero el Toronto:


„...nun mi vivas en Kanado kun mia edzo. Pro miaj knabinoj-esperantistoj mi jam delonge devus doni vivsignon pri mi... Mi tre petas vin, klopodu informi ilin pri eventualaj E-renkontiĝoj, por ke ili ne perdiĝu por la movado. La gepatroj entuziasmas pri E-o; ankoraŭ hejme mi promesis, ke mi zorgos pri ili ankaŭ estonte...Al iu alia mi apenaŭ povus turni min...Jam anticipe mi kore dankas. A.Á."

(Kaj sekvas listo de 13 knabinoj-junulinoj kun unuopaj loĝadresoj.)

Jen la pruvo, ke anima kontakto, ama prizorgado venkas ne nur politikajn-ekonomiajn epokojn, sed ankaŭ geografiajn distancojn.

BARCSAY Zsuzsa

Franca instruistino, Monique Arnaud, kun lernanto esploras Esparol ne per IBM sed per sursina komputilo. La nova parol-skatolo videblas maldekstre.



Esperanta parolsintezo nun ankaŭ por IBM PC

La plurlingva parolsinteza sistemo MULTIVOX estis evoluigita en la Parolesplora Laboratorio de Budapeŝta Teknika Universitato kunlabore kun la Fonetika Laboratorio de la Hungara Akademio de Sciencoj, simile al la antaŭa sistemo por Commodore-komputiloj. La replanita kaj antaŭ nelonge finpretigita sistemo — memstara parolskatolo konektebla al printila interfaco kun disketo kun iu el la menciitaj lingvoj — funkcias per IBM PC kaj kongruaj komputiloj. La esperanta varianto distingiĝas per propra nomo ESPAROL, kaj ligiĝas al d-ro Gábor Olaszy (gvidanto de la Fonetika Laboratorio) kaj d-ino Ilona Koutny (Esperanto-fako de Universitato Eötvös).

MULTIVOX kaj ĝia E-varianto ESPAROL povas prononci frazojn enigitajn laŭ la ortografio de la donita lingvo tra la klavaro de komputilo, laŭtlegi tekstojn antaŭe storitajn kaj eĉ librojn aŭ tajpitajn tekstojn, se kunligite kun iu optika karaktrolegilo (ekz. la hungara RECOGNITA, kiu rekonas ankaŭ la ĉapelitajn literojn de esperanto). La parolfunkcio aktivigeblas el programad-lingvoj laŭplaĉe.

Internaciaj universitataj studoj

pri interlingvistiko komenciĝis ĉe la Universitato Eötvös en Budapeŝto, kies E-fako daŭre jam 25 jarojn instruas e-ologion al tagaj kaj (enlandaj) koresponda gestudentoj. Por la antaŭe anoncita 3-jara internacia koresponda kurso estis granda interesiĝo el la tuta mondo. Fine kun 14 aliĝantoj startis la unua sesio en septembro. Partoprenantoj venis unuavice el la proksimaj landoj kiel Aŭstrio, Svisio, Germanio, Nederlando, Francio, Hispanio kaj Bulgario. Sed aliĝis du kuraĝuloj el Usono kaj unu el Japanio.

Dum 5 tagoj ili partoprenis koncizajn prelegojn pri e-ologio, e-a literaturo, kulturo kaj fonetiko, kaj lingvoperfektigajn okupojn. Instruis d-ro Blazio Vaha, Imre Szabó, István Ertl, Stefan MacGill, d-ro Gábor Olaszy kaj d-rino Ilona Koutny. Poste la studentoj hejme laboros laŭ la disdonita materialo kaj bibliografio, pretigante siajn eseojn. Dum la sekva sesio en februaro la prelegojn anstataŭos konsultiĝoj kaj ekzamenoj pri la subjektoj de la unua semestro. En la tria studjaro ili elektos specialiĝon, kaj fine post ekzamenoj kaj verkado de diplomlaboraĵo ili ricevos magistran diplomon de la Universitato.

La kurso estis eksterordinara ankaŭ en tiu senco, ke pluraj el la partoprenantoj (H. Mayer, F. Simonnet, D. Weidmann) prave povus aperi inter la instruistoj. Tio certigas la altan nivelon de la kursoj kaj la sciencan esploron de Eo dum ili. Ekz. vidiĝis la manko de lingvistika terminaro en Eo, kaj la partoprenantoj decidis labori pri ĝi. Vi certe renkontiĝos kun la verkotaj eseoj sur paĝoj de E-revuoj.

Planado: afero de sentoj aŭ cendoj?

En idealisma movado la ideo submetiĝi al buĝetaj limigoj povas esti frustriga; tamen vane ni havas brilajn kaj bravajn planojn, sed ni ne sukcesas kunordigi la necesajn homajn kaj financajn rimedojn ilin plenumi. Unuafoje ILEI antaŭrigardas finance al postaj jaroj kaj faras por la membraro tre koncizan plurjaran superrigardon. Komentoj laŭ la rubrikoj:

Ni laboregos starigi novajn sekciojn, reaktivigi dormantajn sekciojn kaj perantojn, tamen ni buĝetas nur modestan kreskon de enspezoj el kotizoj, kaj tion preskaŭ tute forglutas la kostojn de IPR, spite la preze avantaĝan kompostadon en Hungario. La stato de Fondaĵo Szerdahelyi en la nuna jaro estas tre kuraĝiga, ĉu ni tro modeste prognozas por 91? La kompensoj de UEA ludas signifan rolon en niaj kalkuloj. Kostoj pro eldonaĵoj etas ĉi-jare sed devus esti pli en 1991. La decido parte kompensi la vojaĝ-kostojn de estraranoj por la februaraj kunsidoj (ne al la konferencoj!) kaj la modesta komenco de honorariado de komisiitoj kreskigas la kostojn, sed esperate ankaŭ la kvanton kaj kvaliton de nia laboro.

La superrigardo suplementas la detalajn informojn en nia antaŭa numero.

Buĝeto 1991 por ILEI

Por pli bone mastrumi la planadon la estraro formulis resuman buĝeton por 1991 kaj diskonigis ĝin kune kun la rezulto de 1989 kaj la prognozo de 1990. La evoluo spegulas la decidon tre etgrade ekhonorarii laboron por larĝigi nian agad-kapablon.

Ĉio en svedaj kronoj

	rezulto		
Rimedoj	**89**	**90**	**91**
Membrokotizo	26.700	27.000	30.000
Libroj	508	600	600
Koleghelpa	1.165	500	500
Fondaĵo Szerdahelyi	225	8.000	5.000
Konferenco	1.730	1.000	2.000
Kompensoj UEA	6.400	8.000	9.000
Rentoj	9.750	9.800	9.800
	50.940	54.900	56.900

	rezulto		
Kostoj	**89**	**90**	**91**
Eldonaĵoj (nete)	15.325	5.000	15.000
IPR	29.302	30.000	31.000
Afranko, telefono	3.450	3.000	4.000
Presaĵoj, fotokopiado	5.560	4.000	5.000
Ekzamenoj (nete)	386	800	2.000
Metodika kurso	295	540	100
Estraro	1.288	3.000	3.000
Honorarioj	–	2.400	5.000
	55.606	48.740	65.100

Interŝanĝo de Esperanto-gelernantoj

Cent jugoslaviaj kaj hungaraj gelernantoj reciprokis vizitojn dum majo kaj junio 1990. Organizite de Internacia Kultura Servo (IKS) el Zagebo, aŭtobuso kun 50 gelernantoj de elementaj lernejoj 'Gustav Krklec', 'Mladost', 'Miroslav Mrŝka', 'Josip Kraŝ' kaj 'Veljko Vlahoviĉ' el Zagrebo kaj Velika Gorica, kun gvidantoj Ankica Benĉek, Marija Jerkoviĉ, Zdenka Svetliĉiĉ kaj kelkaj studentinoj lernantaj Esperanton ĉe SEK, vizitis Hungarion kaj Aŭstrion. Dum 3 tagoj en majo ili gastis ĉe la elementa lernejo 'Nagy László' en la hungara urbeto Pápa. La zagrebaj lernantoj tie prezentis kulturan programeton, kune kun siaj gastigantoj.

Reciproka vizito de la hungaraj gastoj en junio prezentis la okazon viziti zagrebajn hejmojn, tamen dum nur unu tago. S-ro Velimir Lukez helpis al ili konatiĝi kun la urbo. La gvidanto de la hungara grupo estis Jozefo Németh. Kun la grupo alvojaĝis la direktorino de la lernejo en Pápa; kio estos favora por novaj Esperanto-kursoj en la sekvonta lernojaro en Pápa.

Spomenka Stimec.

Ĉi tiaj interŝanĝaj vizitoj inter lernantoj kun malsamaj gepatraj lingvoj estas ege valoraj por pruvi la utilecon de Esperanto kaj krome por larĝigi la horizontojn de la lernejanoj. ILEI kaj IPR povas utile stimuli kaj faciligi tiajn iniciatojn. Instruistoj, kies klasoj volus gasti ĉe aliaj kaj gastigi aliajn, bonvolu komuniki tion al IPR. Ni senpage aperigos viajn alvokojn kaj raportos la rezultojn. Uzu IPR kiel vian afiŝ-tabulon por proponi aŭ serĉi diversajn edukajn servojn, inkluzive de tiaj reciprokaj vizitoj.

smg

'Tintilo' en Budapeŝto

Infana grupo el Varsovio, anoj de Internacia Infana Teatro "Tintilo" vizitis ĉi-somere Budapeŝton. Ili venis kun instruistino de Eo kaj reĝisorino de ensemblo por partopreni "Internacian Eo-Feriadon". La aranĝo estis perfekte preparita de instruistinoj el la Hungara Sekcio de ILEI.

Multaj hungaraj gelernantoj anstataŭ la rusa lingvo nun elektis E-on. Por doni al ili sperton pri internaciaj kontaktoj oni organizis tiun someran feriadon. Alvenis instruistoj el diversaj landoj, ĉiuj kun ĉ. 5-6 infanoj: el Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Pollando, Rumanio kaj Hungario. Ĉiumatene instruiistoj gvidis lecionojn de Eo, poste estis korp-ekzercoj, ludoj, dancoj ktp. En la tria horo ĉiu grupo prezentis ion pri sia lando.

Post tagmanĝo okazis ekskursoj. La instruistoj ligis interesajn kontaktojn kun gekolegoj. La infanoj estis ravitaj; ili interŝanĝis adresojn, volas korespondi kaj energie lerni Esperanton. La celo estis atingita.

Internaciaj ekzamenoj

En numero 1/90 ni aperigis klarigon pri la internaciaj ekzamenoj en 4 naciaj lingvoj. Nun aldoniĝas la franca kaj la itala.

Gli esami internazionali della Associazione Universale Esperantista e della Lega Internazionale Insegnanti Esperantisti, hanno lo scopo di attestare, in primo piano, la capacità di comunicare in lingua internazionale Esperanto. Cioè confermare
- la capacità di comporre un saggio
- di capire testi di argomento generale, sia letterari, sia di avvenimenti, sia letti che ascoltati
- giudicare la capacità di argomentare e di discutere.

E sottinteso, non solo il possesso della base grammaticale della lingua, sia per iscritto, sia letta che parlata, nonchè della comunicazione orale.

Inoltre è inclusa la conoscenza della cultura dell'Esperanto (la sua storia, letteratura, organizzazione ed evoluzione).

Quanto sopra si riferisce agli esami di livello elementare e medio nei quali il risultato viene così espresso: insufficiente, sufficiente, buono, ottimo.

Afin de controler la capacité à s'exprimer dans la langue internationale espéranto, l'Association Universelle d'Espéranto et la Ligue Internationale des Enseignants Espérantophones instituent des examens de deux niveaux: élémentaire et moyen.

Les buts de ces examens sont les suivants:
- confirmer la capacité à rédiger un texte
- vérifier la capacité à comprendre des textes d'intérêt général, littéraires ou non, écrits ou oraux.
- controler la capacité d'expression.

On attend du candidat non seulement une bonne connaissance de la grammaire de base mais aussi la capacité à l'appliquer dans la communication écrite ou orale, active ou passive.

On vérifiera aussi les connaissances du candidat portant sur la culture de l'espéranto (son histoire, sa littérature, son évolution et la structure du mouvement).

Les notes attribuées seront: insuffisant, satisfaisant, bien, très bien.

Ni jam preparis rekomendatan libroliston por la elementaj kaj mezaj ekzamenoj, sed la teksto sidas en la komputilo en KCE. Ni esperis ricevi tiun tekston por aperigi en la nuna numero; legu ĝin venont-numere; ĝi estos por la gvido de kandidatoj kaj la komento de spertaj membroj.

Por statistiko de 1989.

Jen kompletigo de la enketo el la pasinta numero

USSR Krasnojarsk, infana E-klubo, Valerij MALIHIN. 1 Dvorec pionerov, jes, jes, 60, 11–16 jaraj, oficiala, 2 h/sem.; 120 jare; sen ekzameno; KK, IK; dez. kontaktojn kun aliaj pionirdomoj. Ĉiujara kurso de sept. 1988. bez. invitojn al junularaj renkontiĝoj, interŝanĝo de E-libroj, bez. lernolibrojn, metodikajn librojn.

Ĉinio

Elementaj lernejoj

1.Duolun (Interna Mongolio) Elementa Lernejo por Hujoj (Huimin Xiaoxue), s-ro Zhang Dongsong (deekstere): E-kurso por la 3-a jaro; de 89–90; 1- jara; 1h/sem, s. 52 h; kun ekzamenoj kaj poentoj.

2.Chongming (Shanghai) Elementa Lernejo de Lianyi (Lianyi Xiaoxue), s-ro Shen Kunqian; E-kurso por la 3-a jaro; ekde 10.89. 1,5 jara; 2 h/sem, s. 100 h; kun ekzamenoj kaj poentoj kaj diplomo.

3.Chongquing (Sichuan) Sudokcidenta Porinstruista Universitato (Xinan Shifan Daxue) s-ro He Wen'an; dua fremdlingvo por la progresa kurso por asistantoj pri la angla lingvo; 1-jara, ekde 09.88. kaj ripetiĝas; 2 h/sem. s. 70 h; kun ekzamenoj kaj diplomo.

4.Nanchang (Jiangxi) Urba Vespera Universitato por Laboristoj kaj Oficistoj (Shi Zhigong Yeyu Daxue) Vicprof-ino Gu Jianhua (deekstere); Kleriga kurso; duonjara ekde 12.88.; 6 h/sem. s. 96 h; kun ekzameno, diplomo kaj poento.

5.Duolun (Interna Mongolio) Unua Mezlernejo (Divi Zhong-xue) s-ro Zhang Dongsong; por lernantoj (kaj instruistoj); duonjara; ekde 09.88. kaj ripetiĝas de 10.89.; 3 h/sem. s. 72 h.; kun ekzameno, poento kaj diplomo.

6.Dandong (Liaoning) Zhanqian-Elementlernejo (Zhanqian Xiaoxue) s-ro Ma Fengchen; ekde marto 1985; 2,5-jara por la 3-a jaro; 4h/sem. s. 200 h; kun ekzamenoj, poentoj kaj diplomo de la urba E-asocio. La kurso refunkciis dum 1988-03/12 same, escepte de sumo de 100h.

Elementa Lernejo de Liuwilu (Liuwilu Xiaoxue) s-ro Ma Fengchen (deekstere); inter 1986.03. kaj 1987.12. por la 3-a jaro; 4 h/sem. s. 100h; kun ekzamenoj, poentoj kaj diplomo de la urba E-asocio.

7.Tianmen (Hubei) Pandu-Elementlernejo (Pandu Xiaoxue) s-ro Pan Xuanping; A. provkurso por la 4-a jaro, ekde sep. 1988. 1-jara; 2 h/sem. en tagordo. B. Deviga por la 4-a jaro ekde sept. 1989. 2-jara; 2 h/sem. s. 128 h; kun ekzamenoj kaj poentoj.

Mezaj lernejoj

1.Fuzhou (Fujian) Lernejo pri Banko de Fujian (Fujian Yinghang Xuexiao);

supera doc. Jiang Yunlin; E-kurso por fakoj pri asekuro kaj moncirkulado en la 1-a jaro; 1-jara, ekde 11.84. poste de mar. en ĉiu jaro ĝis la jan. de la sekvanta jaro, jam funkciis 6 tiaj kursoj ĝis 12.89.; 2–2,5/ sem. s. 80 h; kun ekzamenoj kaj poentoj, kaj diplomo de la lernejo.

2.Yanshan (Hebei) Shengfu-Mezlernejo (Shengfu Zhongxue) s-ro Chen Shulin; E-kurso por la 1-a jaro de la malsupera parto; ekde 10.89. 1-jara; 2 h/sem. s. 70 h; kun ekzamenoj kaj poentoj.

3.Liaoyuan (Jilin) Speciala Mezlernejo sub la Centro pri Eduko de la Fabriko pri Kotonteksado de Liaoyuan (Liaoyuan Mianfangchang Jiaoyu Zhongxin Zhongzhuanbu) asis-ino Gao Hemei; nedeviga por la fakoj de ŝpinteksaj inĝenierarto kaj teknologio en la 1-a jaro; 1-jara; ekde 09.86. kaj ripetiĝis ĝis 08.88.; 3 /sem. s. 110 h; kun ekzamenoj kaj poentoj kaj diplomo de la provinca E-asocio.

4.Chengdu (Sichuan) Mezlernejo de Huayang (Huayang Xianli Zhongxue) s-roj Li Shijun kaj Liao Zhigen (ambaŭ deekstere) gvidis sinsekve en unu semestro; oficiala sankciite de la lernejestro; 1-jara ekde printempo de 1950; 4 h/sem.; kun ekzamenoj kaj poentoj.

5.Liling (Hunan) Profesia Mezlernejo pri Ceramikaĵo de Liling (Liling Taoci Zhiye Zhongxue) s-ro Ye Su; proponita de la lernejestro mem, libervole elektebla ekde apr. 1986.; 9-monata; 3 h/sem.; s. 84 h; kun ekzameno kaj poentoj.

6.Tianshui (Gansu) Ŝtata Mezlernejo de Gansu (Guoli Gansu Zhonxue) s-ro Feng Wenluo; ekde majo de 1983; 1-jara libervole elektebla; 4 h/sem. s. 120 h; kun ekzamenoj kaj poentoj, kaj diplomo pri la kurso de la lernejo.

Meksikio

Oaxaca (Meksiko) Ignaco Peguera instruis E-on al ĉ. 200 gejunuloj inter 16–17 jaroj en la kurso 1989–90. La programo daŭros almenaŭ en 1990–91. La celo de E-instruado estas, ke la gelernantoj, kiuj studas nur la anglan krom la hispana, kaj kiuj ne povas eklerni latinan aŭ iun alian modernan lingvon pro manko de tempo, trovu en Eo okazon por trarigardi ĝeneralan gramatikon. Eo anstatŭas iel la latinan.

Leteroj

...mi volas scii kelkajn aferojn rilate la e-an agadon de ILEI, nome: ĉu ILEI-ano ricevas ian membrokarton kun specifa registrita persona kodo kiel E-instruisto? Ĉu eblas ie tutmonde fari per korespondado E-an Superan Kurson kun rajtigo al la instruado (oficiale)? Ĉu ekzistas ene de la laboragado de ILEI fako pri starigado de *landaj konsilantaroj* sub la estrado de ILEI kun la celo kunordigi kaj kontroli la E-an lernigadon ĉiulandan?

Alberto Luiz M. Chueiri, Belo Horizonte, Brazilo

Eblas ricevi membrokarton de la kasisto, tamen sen kodo simila al tiu de UEA. Membreco ne signifas aŭtomate ateston pri instrukapablo nek -rajto. ILEI ne organizas korespondajn kursojn pri instru-rajtigo, sed ja aranĝis tri metodikajn kursojn en KCE, Svislando, pri kiuj ni raportis siatempe. Ne nur pri instruado, sed pri ĝeneralaj esperantologiaj konoj la E-fako de Universitato ELTE organizas internacian korespondan kurson (vidu raporton ĉi-numere), kiun kronas diplomo rajtiganta ankaŭ al instruado de Eo. ILEI ne organizas landajn konsilantarojn, sed pluraj el niaj sekcioj tion faras mem. - La red.

Post la deklaro de la restarigo de ŝtateco de Litovio, oni kunigis la klerigan kaj kulturan ministeriojn je unu. Gvidas ĝin juna (28-jara) ministro. Oni atendas multajn reformojn. En mia semajna ĵurnalo (16-paĝa) estas respegulataj pedagogiaj problemoj de ĉiuŝtupaj lernejoj, de infanĝardeno ĝis universitato. Nia lando estis longe izolita de Eŭropo. Niajn pedagogojn interesus artikoloj pri la ĉiutagaj aferoj de iliaj kolegoj, kiaj estas la problemoj kaj kiel ili solviĝas. Dezirinde, ke aŭtoro prezentu konkretan lernejon. Por komenco, artikolo estu 8-10 tajpfolioj + fotoj tre dezirindaj — sed fakte, gravas la intereseco, ne la longeco de la artikolo.

Arvydas Kaspariunas, ĵurnalisto,
Vilnius 40. P.O.B. 1472, SU-232040, Litovio

Mi estas 34-jara estrino de infanĝardeno kaj gvidanto de elementa E-kurso. Mi intencas eklabori laŭ la eduksistemo de M. Montessori. Mi ŝatus kontakti kun ĉiuj, kiuj interesiĝas pri tiu sistemo.

Laima Krivickiéné, a. k. 24, SU-235000 Jonava - 1, Litovio

MALFERMITA LETERO AL S-RO GERMAIN PIRLOT (fragmento)

Kara sinjoro!

Mi elkore dankas la 8-an eldonaĵon pri la monda E-instruado. Mi ege bedaŭras, ke ĝi estos la lasta! Sed mi komprenas vian decidon, se nur la triono de la gekolegoj reagis al via alvoko. Sed via ĉefcelo ne estis mistrafita! Ekzemple, laŭ informoj el via kajereto mi kontaktiĝis kun Johano Ksiazek el Pollando: ni organizis po dufoje unusemajnajn vojaĝojn por niaj studentoj kaj kolegoj; el nia kontakto formiĝis eĉ ĝemelurba rilato inter mia urbo, Eger, kaj la urbo Piotrków-Trybunalski en Pollando. Pri tiu pola urbo oni ne plu trovas indikojn en la nova eldono de via verko, ĉar okazis tie ŝanĝoj en la E-instruado pro institutaj aŭ personaj problemoj. Jes, ĉe ni la malinteresiĝon plejparte kaŭzas tre-tre gravaj ŝanĝoj en la ĉiutagaj aferoj de la homoj – kiuj ne respondis, tiuj eble atendas la elformiĝon de novaj instruebloj, pri kiuj ni ne rezignas ĉi tie en niaj lernejoj, en la finbastiono de la E-movado!

Viktória Balogh, Eger, Hungario

Somera praktiko

Hungario estas senmara lando, kaj tamen oftas piratoj en ĝi. Krom metodikaj piratoj, jen aperis la turismaj. Almenaŭ estas kelkaj oficialuloj, kiuj tiel simpligas la eventon, ke dum tiu somero estis organizita feriado por lernejanoj laŭ la iniciato de simplaj intruistinoj.

Kio ĝi estis laŭ la vidpunkto de la organizantoj?*

Hungara Sekcio de ILEI sukcesis konkeri novbakitan Esperantistinon, kiu kun plena naiveco de novuloj konatiĝis kun la komunumo de esperantistoj, kun la instruaj (metodikaj kaj organizaj) problemoj de la lingvo. Okazis tio printempe de 1990, do en tiu studjaro, kiam la unuan fojon post pluraj jardekoj la hungaraj lernejanoj libere rajtis decidi, kiun unuan fremdan lingvon ili deziras eklerni. Tricento da naŭjaraj lernantoj elektis Esperanton. Informiĝinte pri tio, la nova kolegino tuj demandis: kie okazos internaciaj someraj ferioj por tiuj lernantoj? Ŝi ne tro longe miris pro la balbuta, nea respondo, sed esploris la eblojn en sia lernejo (hazarde kun studenthejmo) kaj proponis organizi dektagan internacian kunvenon. Ŝi zorgis pri loĝado-nutrado-programo, la sekciestro pri la invito de infanoj kaj instruistoj.

Post rifuzo de peto je subvencio ĉe urba konsilantaro, estis preparita tre strikta buĝeto. La otaj elspezoj estis dividitaj per la nombro de partoprenontoj, la kvociento iĝis la partoprenkotizo, pagenda surloke. Unu eksterlanda grupeto ne obeis la peton de organizantoj pri la pagmaniero, tial lastmomente oni devis malmendi la restoraciajn vespermanĝojn – kaj la kuiristinon, kiu estus pretinta okupiĝi nur pri matenmanĝoj. La du simplaj instruistinoj-organizantoj subite transformiĝis je „kuirejaj feinoj", kaj ilian duman profesian kompetentecon signife limigis la nivelo de pan-montoj kaj lavuja akvo. Feliĉe, la invititaj instruistoj rapide formis spertan teamon por plenumi la fakan gvidadon laŭ la pli frue vortumitaj principoj.

La ĉefa ideo estis krei internacian etoson, iomete lerni la lingvon antaŭtagmeze por pli sukcese utiligi ĝin ankaŭ dum la posttagmezaj okupoj. El la sesdek infanoj kvardek estis hungaroj (el sep lernejoj), dudek venis el kvar landoj (2 grupetoj el Pollando, po unu el Rumanio, Jugoslavio kaj Ĉeĥoslovakio). Notindas, ke ĉiuj eksterlandaj grupoj kontaktitaj laŭ artikoletoj de la revuo Juna Amiko akceptis la inviton (senditan en majo!).


Oni strebis miksi la infanojn laŭnacie ankaŭ formale: ili mikse loĝis en komunaj ĉambroj, ili mikse lernis en grupetoj, ili mikse ekskursis. Diversnaciaj instruistoj laŭvice okupiĝis pri la grupetoj. Ĉiutage okazis tri-kvar „studhoroj": sporta-danca-muzika moviĝo; informoj pri la posttagmeza programo; konatiĝo kun la respektivaj landoj de la partoprenantoj; kantado; konstanta okupo por priparoli ĉiutagaĵojn ĉiam kun la sama grupestro. Laŭintence ĉiuj studhoroj devis esti interaktivaj, pli mozaikaj ol sistemaj, kun la celo motivigi la gelernantojn je plia lerneja lingvolernado. La priprogramajn lecionojn gvidis kursanoj pri metodiko de HEA, tio estis ilia modelleciono je ekzameno. Tio estis bona ideo, ĉar la infanoj konatiĝis kun pliaj sep Esperanto-parolantoj; tiuj instruistoj/instruantoj spertis vivan situacion, faris utilan laboron kun grandega entuziasmo el kio profitis denove la lernantoj. La prezentiĝo de poloj kaj ĉeĥoj iĝis vera kultura evento.

Posttagmeze okazis aŭtobusaj ekskursoj al diversaj vidindaĵoj de Budapeŝto (reĝa palaco, Nacia Muzeo, zoologia parko, ŝipekskurso, Agrikultura Muzeo, Insulo Margerita ktp.); ĉiu tago finiĝis per baniĝo en iu naĝejo.

Grandan dankon ni ŝuldas pro la realigo de tiu iom kaprica, sed bonintenca, eble ripetenda kaj certe pliperfektigebla projekto al la sindonemaj gekolegoj: Hanka KWASNIEWICZ, Teresa JANKOWSKA, Teresa KURPIAS, Malgorzata MATUSZEWSKA (PL); Hana ILKOVÁ, Vladimír ROTREKL (CS); Stipo ŠARIĆ (YU); Kornélia BILOUS-NAGY (RO); JUHÁSZ Magdolna, KISS József (H) – la organizantoj: HIDEG Ildikó kaj

KOVÁCS Márta.

* La vidpunktoj de la lernantoj kaj instruistoj estos prezentitaj en la sekva numero de IPR.



Audrey C.E. Childs-Mee (1926-1990)

Mortis en majo en Kibworth, Leicester (Anglujo) unu el la plej konataj kaj respektataj pedagogoj de nia movado. Ŝi esperantistiĝis en 1962 kaj rapide aplikis al la lingvo sian jaman scion pri lingvo-instruado. En 1973 ŝi iĝis profesia esperantisto en la Centra Oficejo de UEA, kie ŝi interalie redaktis la Jarlibron. Poste, ŝi dediĉis pli kaj pli da tempo al instruado, precipe pere de la Cseh-metodo, kiun ŝi modernigis, verkante metodologian verkon *La baza kurso de Esperanto* (1978) kaj la furore sukcesan *Saluton! Esperanto aŭtodidaktike* (1983), kiu jam aperis en kvin eldonoj. Ŝi gvidis multajn seminariojn por instruistoj kaj ĉiam insistis pri korekteco kaj alta nivelo. Ŝiaj vojaĝoj konatigis ŝin en Aŭstralio, Pollando, Usono, Francio, Bulgario kaj plie. En 1988 en Kerkrade, ŝi elektiĝis sekretario de nia Ligo.

Kiu sekvas en la paŝoj de Audrey Childs-Mee rapide konstatas la influon kaj bonajn memorojn, kiujn ŝi post-lasas. Dum multaj jaroj ŝi kuraĝis dediĉi sian tutan energion al Esperanto kaj precipe al ĝia instruado en plej diversaj kursejoj kaj landoj. Tio estas tasko certe ne finance avantaĝa kaj krome fizike kaj spirite peza; ege malmultaj instruistoj en la historio de nia lingvo pretis aŭ povis tion entrepreni, Audrey tamen portis al ĝi grandan forton kaj entuziasmon tuj senteblan.

Ĉi-somere en la kursoj de San-Francisko la kontribuo de Audrey antaŭ unu jaro estis klare memorata kaj aprezata. La sciigo pri ŝia morto portis aflikton ne nur pro persona amikeco, sed krome pro aro da kurantaj instru-projektoj kaj komunaj esperoj, kiuj nun ne plu povos realiĝi.

Ŝia forpaso estas granda perdo al nia Ligo, al ŝiaj kolegoj kaj kunlaborantoj, kaj al miloj da kursanoj tra la mondo.

smg

HONORAJ MEMBROJ

Peter Zlatnar (YU, 1984) – Mario Dazzini (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986)
Irja Klemola (SF, 1986) – Olle Olsson (S, 1986) – Jozef Toczyński (PL, 1986)
Helmut Sonnabend (D, 1987) – Catina Dazzini (I, 1988) – Szerdahelyi István (H, 1988)
M.H. Saheb-Zamani (IR, 1989)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Argentino : Herminia Kirkerup de Fernandez (s-ino), Calle Cerrito 1.249, Barrio San Martín, RA-5000 Córdoba, (Córdoba)
Aŭstrio : Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgio : Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1700 Dilbeek
Brazilo : Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britio : Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 82D
Bulgario : Ivanka Spasova, j.k. Lenin bl. 20, vh. 3, BG-1124 Sofia
Ĉeĥio : Vêra Barandovska, Volgogradská 41, CS-70400 Ostrava 3
Ĉinio : Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normal University, 430070 Wuhan, PR China
Estonio : Palu Johannes, Solme 21, SU-200016 Tallinn, Estonio
Finnlando : Synnöve Mynttinen, Pursimiehenkatu 12 B 46, SF-00150 Helsinki
Francio : Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim
F.R. Germanio : Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, D-W-8900 Augsburg
: Till-Dietrich Dahlenburg, Feldstr. 13, D-O-2722 Brüel
Hispanio : Manuel López Hernández, Poştkesto 832, E-41080 Sevilla
Hungario: : Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo : Murĵan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio : Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanio : Toi Kunio, 1448-1 Simotakajyanagi, Kazo-si, Saitama 347
Jugoslavio : Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotorož
Korea Resp. : Gilsu So, Sodaemun, P.K. 59, Seoul-120
Nederlando : D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko : Doroteo Holland-Kaupp, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
Norvegio : Åge Melå, Beverstien 2, N-3190 Horten
Pollando : *Vakas*
Portugalio : Alexandre Kasesa, Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa
Sanmarino : Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 San Marino
Slovakio : Anton Zachariáš, Sobotské námestie 6, CS-05801 Poprad
Sud-Afriko : Japie Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522, Suid-Afrika
Svedio : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby
Svislando : Edgar Jobin, F.W. Dubois 11, CH-2400 Le Locle
Venezuelo : Inĝ. Felix Garcia Blasquez, Apartado 75.090, YV-1070 A Caracas
Zairio : Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

REPREZENTANTOJ

Bangladeŝo : Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
Centrafrika Resp. : Luc Feidangai, B.P.960, Bangui
Ĉilio : Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Hindio : Abani Halter, Jamboni, P.O.Bolpur 731204, W. Bengal
Irano : Mohammad Karamudini, P.O.Box 13445-747, Tehran/Iran
Niĝerio : Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Ekpoma Bendel
Tanzanio : Mramba Simba, S.L.P. 1051, Bunda Mara

LABORKOMISIONOJ

Statistiko : Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, B-8400 Oostende Tel. (059) 70.87.00

Didaktikaj lud(il)oj : Georges Sossois, rue du Basson 79, B-6001 Marcinelle Tel. (071) 43.62.05

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C)
: 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.
Reprezentantoj de ILEI:
James Fairbank, 6 Avenue Th. Rousseau, F-75016 Paris
François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris

UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

IEI : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

KCE : Kultura Centro Esperantista, BP 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Kontribuajoj al IPR

tajpitaj kun duobla interspaco kaj marĝenoj, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon)

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 40 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instru-istoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby (Svedio).
2) poŝtĝirkonto: 3789 64 de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (**Ne**derlando), por la interna konto ILEK-A de ILEI.